

# EL POPOLA ĈINIO

中國報

5

1997

ISSN 0032 - 4361

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

Esperanto

KUL

v-19034/1987

La ĉina popolo  
dankas lin

La Ĉina Junulara Tago  
Akvofaloj en  
Huangguoshu





Lotusfloro

Foto de LIU SIGONG

## INTER NI

Mi abonis EPĈ antaŭ nur unu jaro, sed es-  
pereble mi restos via abonanto por ĉiam. Mi  
estas historiisto kaj min ege interesas materialoj  
pri la ĉina historio, ĉina kulturo kaj kiel esper-  
antisto — materialoj pri la ĉina E-movado. Min  
tre interesas ankaŭ artikoloj pri kripluloj (ekz.  
pri Mao Zifu en la 2-a numero), ĉar mi mem  
estas kriplulo ekde la infaneco. Mi ofte uzas  
materialojn el EPĈ en miaj artikoloj por nia  
urba gazeto “Peĉora tempo” pri la ĉinaj kulturo  
kaj vivo.

EPĈ estas unu el la plej interesaj kaj legindaj  
E-periodaĵoj en la mondo, mi opinias. Sed, laŭ  
mi, ĉiam eblas plibonigi eĉ la plej bonan gazeton.  
Kaj mi proponas publikigi en EPĈ diversajn  
puzlojn, taskojn, ankaŭ ŝakproblemojn ktp., por  
ke viaj legantoj “rompu la cerbon” super ili. Ĉu?

SHEVCHUK JURIJ (Rusio)

Mi tre ŝatas legi artikolojn pri la disvolviĝo  
de Ĉinio kaj pri ĝia popolo. Kun granda plezuro  
mi legis pri la kutimoj kaj moroj de nacimalpli-  
multoj, precipe pri poemoj kaj popolkantoj.

JIM JONES (Aŭstralio)

Ekde 1983 mi estas legantino de via revuo,  
kiun mi legas de la unua ĝis la lasta paĝo. Mi  
rimarkis lastatempe pli da eroj interesaj kaj mal-  
longaj pri vidindaĵoj, moroj kaj kutimoj aŭ ak-  
tualaĵoj, notoj pri gravaj esperantistoj kaj Esper-  
antaj lingvo kaj problemoj.


BIANCA RAVIOLO (Italio)

Mi ŝatas legi vian revuon “El Popola Ĉinio”,  
sed pro diverseco de kulturaj fonoj (kaj eble  
ankaŭ pro mia nesufiĉa klereco) mi ofte ne  
komprenas diversajn vortojn kaj esprimojn en  
via revuo. Bonvolu klarigi ilin.

SONJA ZEDNIKOVA (Ĉeĥio)

# El Popola Ĉinio

5 [464] 1997



Deng Xiaoping kaj kampanano  
Foto de Yang Shaoming

Deng Xiaoping estis ĉeflaborinto de la politiko de reformado, pordomalfermo kaj moderniga konstruado de Ĉinio kaj fondinto de la teorio pri konstruado de socialismo kun ĉinaj karakterizaĵoj. Li dediĉis sian vivon al prosperiĝo de Ĉinio kaj riĉiĝo de la popolo, kaj ĉi tiu tre amas lin. La foto montras, ke li inspektis kampanon somere de 1980.

## EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo  
**Redaktata** de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

**Distribuata** de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"

**Direktoro:** Hou Zhiping


**Adreso:** P.O. Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio

**Telefono kaj telefakso:**  
+86-10-6832 1808

# ENHAYO

- 2 **INTER NI**  
4 La ĉina popolo dankas lin  
8 Intervjuo kun s-ro Francisco L. Veuthey  
10 **ORIGINALE VERKITAJ:**  
Poemoj  
12 Mia vivo  
14 **ESP-NOVAĴOJ**  
15 **POR KOMENCANTOJ:**  
Rakonto pri fest-torto  
16 **JUNULARO:**  
La Ĉina Junulara Tago  
18 Alilanda burleskulo de Sichuan-opero  
20 **SUR NIA LIBROBRETTO:**  
Verkoj de muzikistoj-esperantistoj; Interesa Esperanta Lernolibro  
21 Akvofaloj en Huangguoshu  
24 Informoj pri Hongkong (I)  
25 **EN ĈINAJ URBETOJ:**  
Gajaj drak- kaj leon-dancoj de kampananoj  
28 Naskiĝloko de Li Bai  
29 **LAŬ LA SILKA VOJO:**  
Fascinanta Dunhuang (I)

- 36 **ĈINA KULTURO:**  
Primitiva terkultivado per fajro kaj tranĉilo  
38 Novgeneraciaj reĝisoroj de ĉinaj filmoj  
42 **FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:**  
Pri "familia investo" de ĉinoj  
44 **EL ĈINAJ GAZETOJ**  
45 La lastaj karavanoj  
46 **EKONOMIE:**  
Kurantaj aferoj; Post liberigo el pezaj ŝarĝoj; Fusong — ginsenga gubernio  
49 **POR VIA SANO:**  
20 sanigaj ekzercoj (III)  
2 Lotuso
- SUR LA DORSKOVRILO**  
**[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]**  
Ĉe boat-kaja strato de Venecio; Parko en San-Diego de Usono



## Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

1. Fusong (p. 48)      2. Kantono (p. 47)  
3. Shunyi (p. 25)    4. Medo (p. 45)  
5. Jiangyou (p. 28)   6. Guizhou-provinco (p. 21)

# La ĉina popolo dankas lin

**L**A 19-an de februaro 1997 Deng Xiaoping (Deng Ŝjaŭping), epokfara persono de Ĉinio, forpasis, kio tre doloris la ĉinan popolon. Kelkajn tagojn post lia forpaso, loĝantoj kun larmoj en la okuloj svarmis ambaŭflanke de la strato kondukanta al Babaoshan-kremaciejo en la okcidenta parto de Pekino por adiaŭi lin.

Iu kamparano diris plorsingultante: “En la moderna Ĉinio aperis du grandaj personoj, Mao Zedong kaj Deng Xiaoping. Mao starigis la novan Ĉinion kaj Deng riĉigis ĝian popolon.” Iu studento diris: “Deng Xiaoping ŝanĝis la sorton de ĉiu ĉino.” En la okuloj de la ĉinoj li estis afabla maljunulo, unu el la fondintoj de la nova Ĉinio, legenda revoluciulo, prudenta kaj sprita politikisto kaj diplomato kaj ankaŭ persono, kiu sin ligis kun la sorto de la nuna Ĉinio kaj la estonteco de la ĉina popolo.

Deng Xiaoping naskiĝis en 1904 en malgranda vilaĝo, Sichuan-provinco, sudokcidenta Ĉinio. 16-jara, li forlasis sian hejmlokon por lerni en Francio. Tie li sisteme studis la

marksisman teorion kaj komencis sian revolucian vivon. Ekde tiam li havis fortan deziron riĉigi Ĉinion kaj altigi la vivnivelon de la ĉina popolo. Kiam li estis 26-jara komandanto, li diris al iu malriĉa kaj malsana maljunulino: “Onjo, ni certe vivos bone, kiam sukcesos la revolucio.” Li donacis al ŝi 200 monerojn kaj poste sendis kuraci ŝin kaj ripari ŝian domon.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949 li fariĝis unu el la gravaj gvidantoj de Ĉinio kaj dediĉis sian energion al konstruado de la nova Ĉinio. En sia politika kariero li plurfoje falis pro persisto en vero kaj principo. Precipe en la kultura revolucio (1966-1976) li estis miskritikita, senigita je ĉiuj oficoj kaj sendita al traktoro-

riparejo por fari tie fizikan laboron. Pro li liaj kvin gefiloj devis forlasi sian familion kaj migris en diversaj lokoj, kaj lia plej aĝa filo eĉ kripliĝis pro sinmortigo, per kiu li protestis kontraŭ la kruela persekuto. Tamen en la malfavora situacio li neniam deprimiĝis, sed havis plenan memfidon al la estonteco de Ĉinio. Ĝuste pro tio li povis denove preni sur sin la gvidantecon. Iu okcidenta politikisto laŭdis lin kiel “nefaliĝeblan malaltulon en la Oriento” (Deng havis malaltan staturon). Oni demandis Deng, kion li pensas, elirinte el la malfavora situacio. Li respondis kun ŝerco: “Malbona afero povas turniĝi en bonan. Tiutempe mi legis librojn pri marksismo kaj multe pensis pri iuj gravaj proble-

## En funebra tago en Pekino





**Funerbrantoj en Hongkong**

moj. Se oni destinos olimpikan oran medalon por tiuj orientanoj, kiuj denove levigis politike, eble mi ricevos ĝin.”

La ĉina popolo dankas lin pro tio, ke li solvis la problemon de 1.2 miliardoj da ĉinoj pri vestoj kaj manĝaĵoj. Li fondis la teorion pri konstruado de socialismo kun ĉinaj karakterizaĵoj, gvidis Ĉinion en ties reformado, pordomalfermo kaj moderniga konstruado kaj kondukis ĝin paŝo post paŝo al prospero. Por Ĉinio la revolucio farata nun en la kampo de ekonomio estas same grava kiel la nov-demokratia revolucio kun la celo liberigi Ĉinion el la duonkolonia kaj duonfeŭda socio. Ĉe la fino de la kultura revolucio la ĉina nacia ekonomio preskaŭ disfalis. Oni devis uzi kuponojn por aĉeti vivbezonaĵojn, kiaj manĝaĵoj, vestoj kaj alumetoj. Pli granda ĥaoso okazis en la kampo de

scienco kaj eduko. En ege malfacila situacio de Ĉinio en la 70-aj jaroj, Deng Xiaoping laboris denove sur grava posteno kaj komencis kuraĝan provadon de ekonomia reformado, nome ĉiuf flankan reordigon de la nacia ekonomio. Dank’ al tio, rapide reboniĝis la industria kaj agrikultura produktado de Ĉinio. Samtempe kun tio, li kaj liaj kolegoj liberigis multajn personojn, kiuj estis maljuste traktataj en la kultura revolucio. Li elmetis la tezon, ke scienco kaj tekniko estas la primara produkta forto, kaj pledis por respekto al scioj kaj intelektuloj. Rezulte de tio, la ĉinaj intelektuloj rekomencis novan vivon kaj supera edukado renormaliĝis post dekelkajara ĥaoso. Ĝuste pro tio Deng ĝuis altan prestiĝon inter la ĉina popolo. En 1984, kiam oni celebris la Nacian Feston sur Tian’anmen-placo en Pekino, iuj procesianoj alte tenis horizontalan


rubandon kun la vortoj “Saluton, Xiaoping”. La simpla saluto esprimis la sinceran amon de la ĉina popolo al Deng Xiaoping.

Deng Xiaoping estis ĉeflaborinto de la politiko de reformado kaj pordomalfermo de Ĉinio. Li skizis plej belan planon por konstruado de Ĉinio. Okcidentanoj opinias, ke tio estas la plej altvalora trezoro postlasita de li al la ĉina popolo. Laŭ lia plano, fine de la kuranta jarcento la totala pokapa nacia produktovaloro de Ĉinio kvarobligos kompare kun tiu en 1980 kaj la ĉina popolo fariĝos bonhava; meze de la venonta jarcento la totala pokapa nacia produktovaloro de Ĉinio estos tiom granda kiom tiu de mez-evoluintaj landoj.


En 1989 Deng Xiaoping emeritiĝis post sia petado. Li esperis pasigi sian maljunecon kiel simpla civitano. En la tago, kiam lia petoskribo pri emeritiĝo estis aprobita, liaj kvar genepoj donacis al li salut-karton kun kvar trikoloretoj alglutitaj al ĝi kaj la vortoj “Nia avĉjo estu ĉiam juna kiel ni”. Ili kisis lin kaj li dronis en ĝojo.

La emerita Deng Xiaoping ankoraŭ zorgis pri la sorto de Ĉinio kaj reunuiĝo de la patrolando. Estis li, kiu prezentis la ideon “unu lando, du sistemoj”. Dank’ al lia ideo Hongkong revenos al la patrolando la 1-an de julio ĉi-jare. Li atendis la alvenon de tiu tago kaj diris: “Mi ege deziras transvivi la 1-an de julio 1997 kaj iri al nia teritorio Hongkong por proprakule rigardi ĝin. Mi certe iros al ĝi, eĉ en rulseĝo.” Bedaŭrinde, li ne realigis sian deziron. Hongkong-anoj tre malĝojis pro la forpaso de la “plej honora gasto” por tiutaga ceremonio. Oni sendis saketon da tero de Hongkong por esprimi la senton de ses milionoj da Hongkong-anoj.


Laŭ lia testamento, lia cindro jam estis disŝutita en maron. Li tamen vivos ĉiam kun la maro, kun la patrolando kaj kun la ĉina popolo. ■




**Deng Xiaoping en 1920, kiam li studis en Francio**



**Deng Xiaoping mobilizis armeanojn kontraŭ japana agreso printempe de 1938.**



**Deng Xiaoping inspektis loĝkvartalon de Tianjin aŭguste de 1986.**



**Deng Xiaoping interparolis kun uigura kamparano en Xinjiang aŭguste de 1981.**



**Deng Xiaoping partoprenis en arboplantado en antaŭurbo de Pekino printempe de 1992.**



**Deng Xiaoping (dekstre) kaj fama ĉina matematikisto Chen Jingrun**

# INTERVJUO KUN S-RO FRANCISCO L. VEUTHEY


Inter aŭgusto kaj oktobro 1996 mi volontulis en la CO de UEA kaj havis ŝancon paroli kun Francisco L. Veuthey, 31-jara argentina e-isto, kies foto kaj bela aŭtografo aperadas en la enkonduko de la gazeto "Kontakto". Min interesis la redaktado de la gazeto kaj lia esperantista sperto...

**Yu Tao:** Vi estas bone konata kiel redaktoro de "Kontakto" kaj "Jarlibro" de UEA, do kiam vi ekhavis kontakton kun Esperanto?

**Franĉjo:** Kiam mi estis infano, mi deziregis lerni la lingvon — ŝajne pro tio, ke mi aŭdis la vorton "Esperanto", kaj ĝi sonis bela al mi. Sed tiam ne eblis, neniu informo disponeblis, nenio ĉemane, neniu sciis, kio estas Esperanto, nur mia patrino diris al mi, ke tio estas "la lingvo de la estonto", sed tio estis ĉio. 14-jara, mi vidis en ĵurnalo anonceton, kaj tuj en la sama tago skribis leteron kaj komencis studi koresponde. Ĉirkaŭ unu jaro poste mi finis la kurson.

**Yu Tao:** En la jaro 1992 vi venis al Roterdamo kaj komencis labori en la Centra Oficejo, kio estis la motivo?

**Franĉjo:** Mi unue iris de Ar-



Francisco en sia oficejo

Foto de CLAY MAGALHÃES

gentino al Brazilo por labori profesie aŭ duonprofesie en Esperanto-klubo de Sorocaba, instruante, redaktante ilian bultenon kaj sabatan radio-programon. Mi ŝatis la brazilan sperton, ĉar dank' al tio mi faris ĵurnalismen en Esperanto. Poste UEA anoncis, ke la posteno de redaktoro de la revuo "Esperanto" vakas, kaj mi kandidatigis. El ĉ. 120 kandidatoj UEA elektis tri kaj venigis nin provlabori en Roterdamo — tiam mi ilustris "Manlibron por novaj membroj" de UEA. Istvan Ertl

vi laboris ĝis noktomezo eĉ tra la tuta nokto, plene vin dediĉante al la revuo, kiu enhavas vian laboron kaj amon...

**Franĉjo:** Mi deziras, ke "Kontakto" estu ne nur bela, sed ankaŭ bona. Nun mi estas tre kontenta pri ambaŭ aspektoj. Komence la ŝanĝo estis frapa. Mi provis fari tian gazeton, kiu povas konkurenci kun aliaj en la ĉiutaga merkato. Tio ne estis vere mia ideo, sed la origina ideo, kun kiu "Kontakto" naskiĝis. Efektive, "Kontakto" estis bonega en la komenco kaj en

fine elektigis kaj, ĉar mi scipovas illustri kaj grafikarangi, kaj la posteno de redaktoro de "Jarlibro" vakos, oni proponis al mi resti. Alie mi nun certe estus ie en Ameriko, okupigante pri io alia. Tamen la redaktado de "Jarlibro" neniel allogis min, ĉar mi estas kreiva homo. Sed ĉar Istvan devis forlasi la redaktorecon de "Kontakto" por la revuo "Esperanto", mi havis la eblecon redakti "Kontakton". Kandidatoj ankaŭ fortis, tamen mi estis pli bonŝanca en tiu elekto ol en la pasinta, al kiu mi vere kandidatigis.

**Yu Tao:** Do ne nur vi estis bonŝanca, sed ankaŭ la legantoj, kiuj nun ĝuas la belegan revuon. Mi vidis, ke foje



aliaj postaj periodoj, sed ne ĉiam. Kiam mi prenis ĝin, “Kontakto” troviĝis en unu el siaj plej malbonaj momentoj, tiom, ke mi havis la taskon eviti, ke oni malfondu ĝin. Tiam venis la momento fari ĝisfundan reviziadon de ĝiaj redakta politiko kaj grafiko. Mi pagis multan tempon esplorante ĝian historion, vidante kia ĝi estis en diversaj epokoj, kaj klopodante absorbi ĝian “spiriton”.

Kiel multaj aliaj gazetoj, en la unuaj monatoj ĝi kostis trovi la vojon, sed poste ĝi komencis difiniĝi kaj preni sian definitivan stilon. Mi ĉiam zorgas, ke ĝi estu bona, ĉar io bela sen bono havas neniun sencon. La sukceso ŝuldiĝas grandparte al la kontribuantoj, kiuj donas al mi la luksan eblon povi vere selekti la materialon por aperigo.

**Yu Tao:** Kiel fartas la rubrikoj de “Kontakto”?

**Franĉjo:** Ni havas la rubrikon “Tentaklo” por niaj legantoj — tiun nomon kaj ankaŭ la simbolon, polpon, mi prenis de la epoko, kiam Stefan MacGill redaktis “Kontakton”. Cetere tiu estas la periodo, kiu plej plaĉas al mi. “Kontakto” estis vere brila revuo en la 70-aj jaroj, kiam okazis revolucioj en la junularo. Nun ĉiuj rubrik-nomoj estas novaj, sed tio ne signifas, ke ĉiuj estas novaj

rubrikoj. Zamenhofa proverbo diras: “Ankoraŭ neniu plaĉas al ĉiu.” “Kontakto” provas defii tiun aserton.

La plej sukcesa rubriko verŝajne estas tiu de enigmoj, ĉar “Kontakto” lotumas interesajn premiojn inter la solvintoj.

**Yu Tao:** “Kontakto” estas revuo por junuloj, kiel vi allogas ilin? Nun en EPĈ ni havas paĝojn por junuloj.

**Franĉjo:** Estas mistere, ke “Kontakton” legas ne nur junuloj, sed ankaŭ multaj nejunuloj. La junuloj interesiĝas pri plej diversaj aferoj, mi ne kredas ke ili interesiĝas pli pri iu temo ol aliaj. En EPĈ mi ŝatas legi ion ekzemple pri arkeologiaj eltrovaĵoj. Sed la kazo de EPĈ estas alia ol tiu de “Kontakto”, ĉar ĝi estas tiom multe pli ampleksa kaj ofta, ke certe ne la tuto devas interesi ĉiujn. Cetere la akurateco de EPĈ estas io, kion alstrebas ni ĉiuj, redaktoroj de aliaj E-revuoj.

**Yu Tao:** Kio estas via hobbio en via nesufiĉa libertempo?

**Franĉjo:** Mi ŝatas kinon. Bedaŭrinde ĉi tie la bileto estas multekosta, tamen mi estas granda subtenanto de kina industrio. Mi ŝatus ligi mian estonton kun kino.

Cetere mi ŝatas piediri, longe babilante kun amikoj se eble, en

la naturo. Mi ankaŭ legas, sed ne tiel multe kiel antaŭe, diversajn librojn en diversaj lingvoj samtempe: la hispana — mia propra lingvo, angla, portugala kaj Esperanto kompreneble.

**Yu Tao:** Vi havas proksimume saman aĝon kun la revuo “Kontakto”, kion vi pensas pri la estonteco de la revuo kaj vi mem?

**Franĉjo:** Estas interese konстати, ke mi estas nur 2 jarojn pli juna ol la revuo, tio praktike estas nenio. Mi certe ne restos eterne kiel redaktoro, ĉar revuo devas havi renoviĝantan stabon. Mi estas 31-jara kaj lasis belan parton de mia juneco en laboro por “Kontakto” — ĉiu litero estas tajpita kun amo, mi faris kaj faras tion per mia tuta koro.


Mi venis al Eŭropo sen amikoj, sen familio, sola, de varma al malvarma medio, kaj multe suferis pro ĉio, interalie pro manko de suno. Malgraŭ tio, mi faris ĉion kun multaj volo kaj amo — multfoje la laboro estas mia fuĝo, mia savo.


En la estonteco, eĉ se mi havos alian laboron, kiam mi foriros de UEA, mi ĉiam restos ligita al Esperanto, ĉar ĝi estas integra parto de mia personeco. Interne mi sentas min tre feliĉa, eĉ se mi aspektas tre serioza ekstere, ĉar mi faras tion, kion mi ŝatas. Certe mi ĉiam restos esperantisto, pri tio mi ne dubas.

Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis de iu amiko ĉiujn numerojn de “Kontakto”, kiujn mi faris ĝis nun, binditajn libroforme. Mi trafolumis la gazeton, kaj apenaŭ povis kredi, ke ni faris ilin! “Ni” estas ankaŭ Roy McCoy, kiu laboras por “Kontakto”, kaj s-ro Rob Moerbeek, kiu provlegas ĝin. Pro “Kontakto” mi eĉ perdis parton de vidkapablo pro longa sidado antaŭ la komputilo, sed mi tamen kontentas, ĉar mia laboro restos por ĉiam nedetrubla. Mi tre esperas, ke la venonta redaktoro de “Kontakto” amos ĝin tiel multe kiel mi. ■

**Francisco (dekstre) kaj la aŭtoro**

*Foto de CLAY MAGALHÃES*





La aŭtoro

## POEMOJ

de JIRI KAREN\* (Ĉeĥio)

### Al ĉiuj sursojle de la kongresa jaro 1996

*Sursojle de la nova jaro  
mi deziras al vi  
ke ĉiu via faro  
estu sukcesa kaj  
absolute sen manko  
ke unu milionon por vi  
deponu en la banko  
bonkore riĉa mecenato  
kaj oni enkonduku Esperanton  
en la tutmondan lernejaron  
laŭ dekreto de la Unuiĝintaj Ŝtatoj  
ke pacon konservu la fato  
por via kaj mia lando  
ne ataku ilin iu ĥano  
aŭ alia danĝera bando  
ne manku al ni pano  
ni ricevu interesajn informojn  
de la samideanoj  
eldonadu revuojn kaj librojn senlace  
kaj seninterrompe  
ĉiam en la stilo kristalklara  
ne rikanu ni antaŭ potenculoj pompe*

### Homo kaj bestio

*La bestio voras murmuris kontraŭ aliul'  
ne ŝatas akcepti gastojn laŭvole  
al neniu ĝi donas eĉ etan porcion  
por la bestio estas sufiĉe  
la hungron forpeli  
Kial do kuiri kial baki spici?  
Nuda ĝi iras strate seksas forume  
objekto de moko ne estas ĝi  
ne ofendas regulojn de la etiko kaj etiketo  
ne ofendas iun tabuon  
ne predikas kontraŭ ĝin la pastro  
la societo ne juĝas ĝin laŭleĝe  
ĝi manĝas voreme parolas boje trinkas drinke  
la domojn ĝi ne konstruas  
feliĉe vivas en malpura budo  
Ofte mi demandas: Ĉu tiu homo  
ne estas nur parolanta  
bestio?  
Homo homiĝas Bestoj bestiĝas  
diradis poetoj de hieraŭo  
Besto homiĝas Homo bestiĝas  
diras mi kaj aldone mi  
en mia poezio demandas  
Ĉu la futuro homa  
futuraĝas aŭ futuriĝos la pasinteco besta?*

### Ŝajno kaj realo

*Kvankam sume nur simplaj muŝoj  
flugis zume ĉirkaŭ lampo  
ne povante dormi  
komencis mi formi metaforojn  
Fikcias mi: Mem la Dio  
diktas al mi melodion  
de profunda mesaĝo  
Poeto mi hipokrito  
truon vidante  
mi fikcias tuj: Kosman pardonon  
de oktodimensia mondo  
/pri kiu parolas Dante/  
mi disrompis  
Realo aspektas kiel ŝajno  
preteksto simulas la realon  
Kia poste la poemo?  
Miaj fuŝe faritaj poemoj  
senmove kuŝas sur tablo  
Rimoj mankas Ritmo lamas  
Vane verki se mi*

*talenton ne havas  
Certe okazis ke mi oazis  
kiam Dio dignon disdonadis  
Tamen mi poezias gaje  
pri arboj en vetero maja kaj tiel plu*

## Ni ŝirmas arbaron

*Bonodoran aeron  
ĝi disdonas  
senpage*

*/Piceo gardis nin  
Pikema robinio  
instruis nin  
pri grimrado  
kaj la salt'!*

*Ĉirkaŭ la vilaĝo  
en buban  
kaj la veran militon  
akompanis nin  
arboj*

*Ne faligu la arbaron  
de via junaĝo  
La arbo estas pruvo  
de la eterna celado  
supren*

## Promenado ĉe maro

*Hodiaŭ mi eliris promene  
/Maro ŝaŭme svenis/  
Mi iris lante Animon sen pezo  
esperante multon fari  
estiĝinte la heroo*

*Rekte mi iris /ellasante kurvojn/  
foriris de mi taskoj kaj libroj  
aĥoj zorgoj doloro  
Senlimis la ĉemara tero  
neniu kontrolo ĉe limoj  
Neniu kurteno fera  
Signifon perdis mono kaj kontoro  
Ne ĝenas min telefonoj  
Ne ekzistas militoj kaj perfido  
Sukcese laboras miaj idoj  
Ĉie nur ŝaŭmanta maro*

*Vortoj ordigas sin en strofojn  
Sencon la rimo sukcese hokfiŝas  
Senhalte senĉese mi iris iris  
Nenio komencis Nenio finis  
Sur tiu ĉi emocia ondo  
lasas mi min porti kiel ŝipo  
De lontano nur ondovipoj  
instige tuŝas miajn orelojn  
De nenio lasas mi min ligi  
Neniu malĝojo min povas igi  
al io ĉar hodiaŭ mi iras promene  
proksime de la maro*


## Okaze de la naskiĝtago

*Naskiĝtago. Okazo serioze mediti  
ĉu mi sur la bonaj padoj iris  
ĉu mi ne devojis sur la vojokruco  
ĉu mi bonis kiel kristano  
kiam oni batis min en la vizaĝon  
ĉu mi superflue malambagaĵon ne portis  
ĉu mi vere nur la bonajn librojn legis  
ĉu mi verkis librojn kiuj vivi helpis  
ĉu mi ne tro galopis kiam mi devis stari  
ĉu harmoniis vortoj kun la agoj*

*Naskiĝtago Mi meditis  
ĉu mi haltos jam aŭ mi vagados plu  
meditis mi meditis pri sorto  
de miaj malmulte allogaj verkoj  
ĉu iu iam post cent jaroj  
ĉe mia tombo stare haltos  
Naskiĝtago juĝi ĉiun mian agon  
ĝi igas min*

*Tamen ĉion necesan mi havas  
Ideoj ne mankas fantazio produktas imagojn  
ĉambrojn miajn plenigas libroj  
mi legas ilin sciante la enhavon  
kaj amikojn mi havas formikojn diligentajn  
mia animo mian korpon manipulas perfekte  
kaj neniel min ĉagrenas ke la Muzinoj  
sur mian kapon neniun laŭron glore ponis*

\*Jiri Karen, poeto ĉeĥlingva kaj esperantlingva, propranome Ladislav Podmele, naskiĝis en 1920 en Litomyšl. Jam en 1939 li publikigadis versojn en gazetoj, ekde 1972 aperis liaj pluraj verskolektoj kiel "Sekundoj de maturiĝo", "Flugilhava ŝtono" kaj aliaj. Kun Esperanto li konatiĝis en knabeco, sed al Esperanto li revenis en 1979. Li gajnis multajn literaturajn premiojn en la lingvo ĉeĥa kaj en Esperanto.



La aŭtoro, lia edzino kaj ĉina esperantisteto

DIETRICH MEUSEL (Germanio):

## Mia vivo

*La aŭtoro estas 50-jara esperantisto el Chemnitz — mezgranda urbo en la orienta regiono de Germanio. Li jam vizitis Ĉinion dufoje kaj havas bonajn kontaktojn personajn al pekinaj esperantistoj. Li verkis jenan artikolon laŭ nia peto. Ni petas similajn artikolojn, por ke la vivo de ordinaraj esperantistoj estu konata de niaj legantoj en diversaj partoj de la mondo.*

**La Red.**

**A**L demando de mia longjara E-amikino kaj tradukistino Wang Lihua, ĉu mi emus kaj havus sufiĉe da tempo por skribi artikolon pri la tipa ĉiutaga vivo ĉe ni, tuj mi respondis per jes. Unue mi pensis: nenio pli facila ol tio. Sed nun mi sidas antaŭ mia skribmaŝino kaj cerbumas. La kapo ne povas kapti klarajn pensojn. Ho, kio estas tipa ĉiutaga vivo en iu lando, tiel ankaŭ en Germanio? Ĉu mia ĉiutaga familia vivo estas tipa por la tuta Germanio?

Foje iu demandis min: ĉu vi vivas pli bone ol antaŭe aŭ pli malbone post la unuiĝo de la du partoj de Germanio? Klare formulita demando, sed ege komplika por respondi en du aŭ tri frazoj. Mi respondis, ke ĉiuokaze nun ni vivas alie ol antaŭe.

15 jarojn mi laboris kiel instruisto en la tiel nomata Publika Deĵoro. Ĉe la unuiĝo de ambaŭ partoj de Germanio mi perdis mian laboron kiel multaj aliaj pro

samideaneco al GDR (Germana Demokratia Respubliko). Sen ŝanco denove labori kiel instruisto longtempe mi vivis de senlaborulomono kaj provis establi turisman agentejon, sed ĝis nun bedaŭrinde sen la necesa sukceso. Nun mi laboras en turisma entrepreno por unu jaro. Tio estas ŝtata aranĝo por okupi senlaborulojn por unu jaro. Tiun eblecon dumtempe mi uzas en la espero, ke pli poste mi sukcesos fondi mian propran turisman agentejon.

Tre grave por mia ĉiutaga vivo estas, ke mia edzino (depost 23 jaroj) havas laboron kaj ricevas salajron de ĉirkaŭ 70% kompare kun laborulo en Okcidenta Germanio. Nia filino finis la abiturientan ekzamenon kun bona sukceso. Ŝi ne tuj trovis lokon por lerni profesion, sed intertempe ŝi lernas la profesion de oficeja komercistino kaj havas bonegajn notojn. Tamen ŝi devas timi, ĉu post la finiĝo de la tri lernojaroj ŝi ricevos laboron.

Mia ĝenerala opinio pri la socio

dum la tempo de GDR estas, ke mi kreskis kaj vivis kiel "lernita" GDR-ano kaj post la fiasko de tiu sistemo (ofte mi komparas tion kun eksedziĝo) nun mi vivas en nova "edzeco" kun avantaĝoj kaj malavantaĝoj same kiel dum la unua "GDR-edzeco". Mi ne funebras la GDR-jarojn. Sed mi memoras la demandon menciitan, ĉu ni vivas pli bone aŭ malpli bone. Bone mi memoras, ke en GDR ni koleris pri multaj politikaj kaj ĉiutagaj aferoj, aliflanke ni vivis kun veraj ĝojoj. Nun ankaŭ ĉiu havas siajn ĝojojn diversajn kaj denove koleras pri aliaj aferoj.

Certe estas leganto, precipe germana, kiu pensas diverse pri mia opinio, sed kiel diras proverbo: "Tri juĝistoj, kvar opinioj". Nun ree al la esenca temo — la ĉiutaga vivo ĉe ni. Certe ege interesa estus kompara artikolo de iu okcident-germana leganto, kiu eble emas skribi post legado.

Longtempe dum pasintaj monatoj mi vekiĝis je la kvina horo,

sed nur, ĉar mia edzino ellitiĝas kaj preparas sin por vojo al la laborejo. Estas tre frue, sed ŝi veturas per nia aŭto kaj pro tio ŝi estas relative sekura. Se ŝi devas iri tra malhelaj stratoj kaj veturi per aŭtobuso kaj tramo, ŝi timas atakojn de krimuloj.

Rapide mi ekdormis denove kaj restis en mia ŝatata lito ĝis la naŭa aŭ eĉ ĝis la deka. Dumtage mi legis, migradis aŭ skribis aspirileterojn por laboro. sed tio nun feliĉe estas pasinteco. Nun mi ĝojas forlasi mian liton je la sesa kaj duono por esti je la oka en laborejo en bona sento, ke miaj laboraj agadoj estas bezonataj. De lundo ĝis vendredo ni laboras 40 horojn sume kaj ricevas 21 feriojn jare. La monata salajro estas 2 450 DM, 1 600 DM kiel neta. Mia edzino havas salajron iomete pli multan. Oni notu laŭ mi, ke la sumoj preskaŭ nenion esprimas, se oni ne scias, kiom kostas la varoj kaj servoj. Ekz. ni pagas luprezon de 600 DM ĉiumonate por 54 kvadrataj metroj (sen energio ktp.), unu enlanda letero kostas 1 DM, unu bulko 0,55 DM, unu litro da lakto 1,70 DM, unu litro da benzino meznombro 1,60 DM.

Al la laborejo mi veturas per nia aŭto. Nun ne pensu, ke ni posedas du aŭtojn. La solvo estas, ke mia edzino nun kunveturas per aŭto de kunlaboristino kaj mi veturas per nia propra. La plejmulto de nia popolo posedas aŭton, ne malofte eĉ du en familio (por edzo kaj edzino aŭ jam por la infanoj ekde 18-jara aĝo). Ankaŭ nia 20-jara filino posedas malgrandan aŭton.

Mi laboras en turisma entrepreno. Tie mi ellaboras elektronikan katalogon kun kultur-turismaj allogaĵoj/vidindaĵoj de nia regiono ligite kun vojaĝproponoj unu- kaj plurtagaj. Ofte mi estas survoje al hoteloj, restoracioj kaj aŭtobus-entreprenoj por trakti pri kondiĉoj, aŭtoraj rajtoj, prezoj ktp. Por mi tio estas ege interesa kaj alternorika. Post la ok laborhoroj aŭ pli longe (sen krompago) mi veturas hejmen, poste kun malbona anim-

stato. Kial? Mi loĝas en urbo kun 280 000 loĝantoj kaj la distanco inter la laborejo kaj hejmo estas nur ok km, sed frue kaj precipe posttagmeze dum la tiel nomata tempo de la laboristo-trafiko ne malofte mi bezonas trikvaronan horon pro la densa trafiko kaŭzita en malbona stato de stratstrukturo. Per aŭtobuso mi ne povus pli rapide, sed mi veturus pli multekoste. Reveninte en nian loĝejon en domo kun ses enirejoj kaj ses etaĝoj — konstruita en 1977 el grandaj betonaj pecoj, en tipa GDR-konstrumaniero — iomete mi ripozas rigardante el la fenestro. Mi vidas plurajn samstilajn konstruaĵojn, plejmulte sen balkono kiel nia loĝejo, similajn iomete al kazerno. Ŝerco ni diras pri “loĝsiloj”. Ĉar en nia loĝĉirkaŭaĵo mankas naturo, ni farme prenis ĝardenon proksiman. Tie mi fartas bonege kiel amiko de la naturo. Estas vere necese daŭre forigi la herbaĉon, sed la kreskado kaj florado de la plantoj kaj la maturiĝo de la fruktoj ĉiam denove ĝojigas min. Volonte en la plantodomo de tempo al tempo mi provas novajn kulturadojn. La plej belaj momentoj kompreneble estas la rikolto de legomo.

Pro manko de varma tagmanĝo, ofte ni manĝas vespere je la sepa varman manĝaĵon aŭ nur panon kun kolbaso, fromaĝo kaj salatoj. Mia edzino preferas teon kaj mi bieron. Poste ni televidas kaj babiladas pri laboro aŭ aliaj novaĵoj. Ofte mia edzino intertempe aŭ pretere lavas vestaĵojn per lavmaŝino. Ĉiu familio posedas lavmaŝinon kaj ankaŭ fridujon, plejparte kun glaciaĵilo. Ni posedas telefonon kiel multaj aliaj familioj. Telefakso kaj respondaparato (ĝi akumulas la telefonan alvoko-tekston) ankoraŭ estas lukso por familioj. Sed estas multaj komputiloj, precipe junaj homoj ilin posedas, ankaŭ mi havas pro miaj turismaj agadoj.

Verŝajne vi rimarkis, ke ĝis nun mankas notoj pri partopreno de nia loka E-movado. Mi devas konstati, ke dum GDR-jaroj ni estis grupo de 20 ĝis 30 E-amikoj,

kiuj renkontiĝis regule dufoje monate en granda moderna klubĉambro senpage. Mi mem estas esperantisto ekde 1967. Bedaŭrinde post la unuiĝo de Germanio ni ne plu povas uzi la klubĉambrojn pro tro alta lupago. Nun kelkaj amikoj de tempo al tempo renkontiĝas en loĝejoj de la membroj. Ne plu ekzistas aktiva E-movado ĉe ni — tre domaĝe.

Unu el miaj hobiaĵoj estas vojaĝi. Jam dum GDR-tempo mi vizitis landojn kiel Ĉeĥoslovakio, Pollando, Hungario, Bulgario, Rumanio kaj Sovetunio (ekz. la montaro Kavkaso kaj la maro Kaspi). Intertempe ni nun havas ankoraŭ tute aliajn eblecojn. Mi vizitis ĉiam por unu aŭ kelkaj tagoj Danlandon, Aŭstrion kaj postmilitan kaj parte detruitan Kroation. Kiel solida kaj entuziasma amiko de Ĉinio, mi interesiĝis pri ĝia kultura historio kaj ĝia hodiaŭa vivo. Plenumiĝis mia longjara revo viziti tiun imponan landon kun ĉarmaj kaj tre gastamaj homoj. Mi restis en Pekino kaj ĝia ĉirkaŭaĵo en 1991 kaj 1993. Ekde tri jaroj mankas al ni mono kaj ni atendas pli bonajn jarojn. En 1996 ni feriadis en nia provinco Saksujo, en pitoreska regiono oriente de la urbo Dresden proksime de la pollanda landlimo.

Resume, ni havas bonan vivnivelon, sed ĉiam ni pripensas, kiamaniere ŝpari por aliflanke havi la necesan monon por ekipaĵoj, por posedi monorezervon. Pro tio dum libera tempo iam kaj iam mi ricevas kromsalajron iomete per gvido de vojaĝgrupoj. Ni ne vizitas restoraciojn por manĝi nek kinejojn, sed tre malofte teatron aŭ varietean teatron. Ni posedas nur simplan aŭton kaj hejme ni multe mem riparas kaj tapetas. Nia ŝranko staris jam 20 jarojn, la remburitaj mebloj havas pli ol dek jarojn kaj la televidilo ok jarojn. Laŭ ni, se oni bone kalkulas la ĉiutagan vivon kaj elspezojn, oni havos bonan vivon, kvankam portempe ne estas eble ŝpari monon por grandaj elspezoj. Sed ni estas certaj, ke la estonteco havos pli agrablan situacion kaj jarojn por plenumi kelkajn revojn. ■



E-istoj de Dandong festantaj la Zamenhofan feston

## ĈINIO

- Decembre de 1996 e-istoj de Dandong de Liaoning-provinco, Taizhou (Tajĝoŭ) de Zhejiang-provinco kaj Xinxiang (Ŝinŝjang) de Henan-provinco respektive kunvenis por festi la 137-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof.

(Ma Fengchen, Zhu En kaj Han Daozhu)

- Decembre de 1996 fondiĝis la Fuyang-a Esperanto-Asocio de Anhui-provinco. Fang Xuexian (Fang Ŝjueŝjan) kaj Gao Wenlin estis elektitaj respektive kiel ĝiaj prezidanto kaj ĝenerala sekretario. Post sia fondiĝo la asocio okazigis fest-kunvenon por la 137-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, konsultiĝan aktivadon pri Esp. kaj Esperantan kurson. (Adreso: Gao Wenlin, Fuyang-a Esperanto-Asocio, Shenglilu, Shangchang, Bei-sanlou, Wuye Gongsi, Fuyang, Anhui, 236001 Ĉinio.)

- Lastatempe Guozhuangzi-mezlernejo de Tianjin okazigis E-kurson, kiun gvidis s-ino Liu Jun. Post du monatoj 25 lernantoj povas simple paroli. Germana esperantistino Natalie Schuchert, kiu studis en Tianjin, ofte vizitis ilin por ekzerci ilin en parolado. La junaj geesperantistoj volas kontaktiĝi kun junaj amikoj el diversaj landoj. (Adreso: Liu Jun, Guozhuangzi Zhongxue, Hedongqu, 300011 Tianjin, Ĉinio.)

- De oktobro ĝis decembro 1996 la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko emisiis la poŝtmarkoseriojn "La 47-a Jarkunveno de Internacia Kosmonaŭtika Federacio", "La Pejzaĝoj de la Urboj", "La 60-a Datreveno de la Venko de la Longa Marŝo", "La Popola Kolora-modlo de Tianjin" kaj "La Ekonomiaj Konstruoj de Hongkong". La Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco uzis en la emisiaj tagoj memorigajn poŝtstampilojn en la ĉina lingvo kaj Esperanto. La desegninto de la poŝtstampoj estas s-ro Zhang Linrui.

## GERMANIO

- La 48-a Kultura Semajnfino (KSF) de Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL) de la 13-a ĝis la 15-a de decembro 1996 havis 80 partoprenantojn el diversaj landoj en kvar kursoj — inter ili du Mazi-kursoj por diversaj gradoj de komencantoj, unu porprogresinta kurso kaj la

prelegserio de d-ro Werner Borman, prezidanto de la Akademio de Esperanto.

La 49-a KSF de SEL okazos de la 30-a de majo ĝis la 1-a de junio 1997, kun Stefan Maul kiel preleganto, kaj la 50-a KSF de SEL — la jubilea — de la 7-a ĝis la 9-a de novembro 1997 supozeble pri Ivo Lapenna — 10 jarojn post lia morto. (Günther Becker)

## FRANCIO

- La Kultura Junulara Domo (F. Dieuze), franca sidejo de la Internacia Klubo de Esperantistoj-Handikapuloj, memorfestos siajn 40 jarojn en junio 1997, grava momento por disvastigi Esperanton. La klubo celas prezenti la maksimumon de poŝtkartoj el ĉiuj landoj. Bonvolu sendi salutpoŝtkartojn al: IKEH, Maison des Jeunes, 57260 Dieuze, Francio.

(Wagner Andre)

- E-kursoj en 1997:

Kursoj por komencantoj (unua parto) kaj praktikantoj: de la 6-a ĝis la 13-a de julio. Kursoj por komencantoj (dua parto) kaj praktikantoj: de la 13-a ĝis la 20-a de julio. Kursoj por komencantoj (unua parto) kaj praktikantoj: de la 20-a ĝis la 27-a de julio. Kursoj por komencantoj (dua parto) kaj praktikantoj: de la 27-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto. Kursoj por komencantoj (unua parto), praktikantoj kaj lertuloj: de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto. Kursoj por komencantoj (dua parto), praktikantoj kaj lertuloj: de la 10-a ĝis la 17-a de aŭgusto. Kursoj por praktikantoj kaj lertuloj: de la 17-a ĝis la 24-a de aŭgusto. Internacia Amika Renkonto: de la 20-a de junio ĝis la 5-a de julio. Adreso: Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, Kastelo Gresillon, F-49150 Bauge, Francio (B. Cheverry)

## POLLANDO

- Pola Esperanto-Asocio, Filio en Koszalin organizos en la tagoj 9-15 de junio 1997 la deknaŭan renkontiĝon de esperantistoj kaj naturamantoj en la ĉarmega kaj gastama Mielno, nomata perlo de polaj ĉemaraj ripozejoj. Ili kore invitas gesamideanojn el ĉiuj landoj partopreni ilian tradician E-arangon ĉe la Balta Maro. Kontakta adreso: Polski Związek Esperantystow, Pola Esperanto-Asocio, skr. Poczi. 30, 75-016 Koszalin, Pollando. (Pola Esperanto-Asocio)

# Rakonto pri fest-torto

de HUANG WENTING

**T**IO okazis antaŭ multaj jaroj. Mi lernis en iu mezlernejo. Iuvespere, ŝlosinte la pordon de la dormoĉambro, mi estis ironta al la biblioteko por legado. Tiam mia pliĝa fratino haste venis kaj donacis al mi torton pro mia naskiĝtago. Mi metis ĝin sur liton ĉe la fenestro. La lito apartenis al Xixi.

Kiam mi revenis de la biblioteko, la ĉambro estis tre viveplena. Kelkaj knabinoj ĉirkaŭis Xixi. Ĉiu el ili havis pecon da torto. Mi subite ekpensis pri la torto, kiun mia fratino donacis al mi. Antaŭ ol mi sciis, kio okazis, Xixi, tenante mian manon, ĝoje diris al mi: "Kiel ĝoja mi estas! Oni scias, ke hodiaŭ estas mia naskiĝtago, kaj donacis al mi la torton, sur kiu estas bela floraĵo kaj vortoj. Bedaŭrinde vi revenis malfrue kaj ne vidis ĝin..." Mi gapis. Xixi donis al mi unu pecon: "Neniu el ni scias, kiu donacis la torton. Vi la lasta foriris de la ĉambro, mi konjektis, ke vi certe renkontis la donacinton. Diru al mi, ĉu tiu ĉi estas viro aŭ virino." Tiam iu ŝercis: "Certe virino!" Xixi aspektis malespera kaj skuis miajn ŝultrojn: "Diru! Diru!" En tiu momento mi preskaŭ laŭte anoncis — tion mia fratino donacis al mi! Sed, rigardante tiujn gajajn vizaĝojn kaj espero-plenajn okulojn de Xixi, mi povis nur mensogi: "Estas bela knabo!" Ĉiuj manklakis, ankaŭ Xixi ridis.

Nokte Xixi vekis kaj deman-

dis min: "Ĉu la knabo estas nia samklasano?" Mi skuis la kapon, kaj ŝi demandis ankaŭ: "Samlernejano?" Mi klarigis: "Pro malumo mi ne klare vidis la vizaĝon."

En la sekvantaj semajnoj nia semajnfina temo estis la mistera homo. Kvankam oni ankoraŭ nenion sciis, tamen tio helpis nin pasigi multajn tedajn horojn.

Iom post iom ni ŝajne forgesis la aferon. Malofte oni demandis Xixi: "Ĉu vi informiĝis pri la mistera homo?" Ŝi ofte faris nenion alian ol skui la kapon kun veo.

Antaŭ ol diplomiĝi, Xixi ofte sola sidis apud la fenestro, rigardante eksteren kaj karesante purpuran silkan bendon. Eble nur

Xixi kaj mi ankoraŭ memoris la silkan bendon, per kiu oni ĉirkaŭvolvis la skatolon de la torto. Mi certe volis diri al ŝi la veron por rompi ŝian imagon, sed mi ne povis.

Poste ŝia familio estis transloĝigita al alia lando. Mi volis diri al ŝi la veron, sed kiam mi vidis la bendon sur ŝia hararo, mi nenion diris kaj lasis ŝin eniri en la aviadilon kun la dolĉa imago kaj flugi al nekonata estonteco.

Hodiaŭ, post ses jaroj, Xixi, kiu ankoraŭ loĝas eksterlande, jam fariĝis patrino de du infanoj. Kompreneble ŝi sciis poste, ke la rakonto pri la knabo nur estis bela miskompreno. Ŝi ne riproĉis min, sed male dankis min, ke mi donis al ŝi belan rememoron. ■



**La ret-adreso de Andrzej Pettyn, redaktoro de Esperanto-redakcio de Pola Radio: [pettyn@radio.com.pl](mailto:pettyn@radio.com.pl)**



SUN AIJUN:

# LA ĈINA JUN



Rumana kriplulino suriris la Grandan Muron sub helpo de junaj volontuloj

*La 4-a de majo estas la Ĉina Junulara Tago. La ĉinaj junuloj festas sian tagon per diversaj manieroj, kiaj ekskurso, konkurso de kantado kaj amuza kunveno. Tiutage diversrondaj junuloj celebras la datrevenon de eksplodo de la studenta movado, kiu okazis en Pekino la 4-an de majo 1919 kaj donis profundan influon al la ĉina moderna historio. Ĉi-sube mi konigos al vi, niaj junaj legantoj, la Movadon de la 4-a de Majo kaj ĝian influon sur la hodiaŭaj ĉinaj junuloj.*

Suno

**L**A 4-an de majo 1919 pli ol 3 000 studentoj en la Pekina Universitato kaj aliaj 12 pekinaj altlernejoj kunvenis kaj manifestaciis kun la sloganoj

“Por la nacia suvereneco kaj for la naciperfidulojn” kaj “For la subskribon en la paca traktato”.

Post la Unua Mondmilito la alianciĝintaj landoj okazigis la

Pacan Konferencon en Parizo januare de 1919. En ĝi estis decidite transigi al Japanio la privilegiojn de Germanio super la koncesio en Shandong, Ĉinio, kaj ri-



# ULARA TAGO

fuzi la postulon far la ĉina militarista registaro, ke la potencoj forlasu siajn privilegiojn super Ĉinio. Sed la ĉina registaro pretis subskribi la pacan traktaton. In-formiĝinte pri tio, pekinaj studentoj la unuaj protestis kontraŭ la decido. Influate de ili, strikis ankaŭ ĉinaj laboristoj kaj komercistoj en grandaj urboj. Alta tajdo de patriota movado leviĝis tra la tuta lando. Devigite de la firma protesto de la studentoj kaj la popolanoj de la lando, la tiama ĉina registaro rifuzis subskribi la traktaton.

La Movado de la 4-a de Majo, kiu markis la komencon de la ĉina novdemokratia revolucio, estis esence kontraŭimperiisma kaj kontraŭfeŭdisma revolucio de la ĉina popolo. Kun demokratio kaj scienco kiel sia standardo ĝi estis kontraŭ la malnovaj etikoj kaj kulturo kaj por la novaj. Forte influate de la nova pensfluo de la demokratio, scienco kaj vero, la ĉinaj junuloj faris grandan batalon por la landa estonteco kaj la nacia emancipiĝo en la pasintaj historiaj periodoj. Jam forpasis pli ol 70 jaroj. La spirito de la Movado de la 4-a de Majo kuraĝigas la ĉinajn junulojn labori peneme por sia patrio kaj konduiti per memrespekto, memfido kaj memfortigo.

Antaŭ nelonge mi estis informita de la Tutlanda Junulara Federacio de Ĉinio, ke en majo ĝi kaj la Centra Komitato de la Komunisma Junulara Ligo de Ĉinio kune organizos aron da junaj volontuloj kaj sendos ilin al malproksimaj montregionoj por hel-

pi la tieajn loĝantojn sin liberigi el malriĉeco. Inter la 44 organizoj-membroj de la federacio la ligo estas la plej grandnombra kaj plej influhava. Januare de 1997, pli ol 300 volontuloj, inter kiuj estis agronomoj, forsokulturistoj, medicinistoj, artistoj kaj edukistoj, venis al 10 malriĉaj gubernioj por helpi al la tieaj lokanoj sin liberigi el malriĉeco, popularigi sciencojn kaj teknikojn kaj kuraci malsanulojn.

Junaj volontuloj servas en loĝkvartaloj per sanigado, leĝa konsultiĝo, etika kaj kultura edukado. Krom servo-grupo por mallonga tempo, oni organizas ankaŭ junulojn por laborigi ilin 1-2 jarojn en malriĉaj regionoj. Pli ol 50% de junuloj el la ĉinaj urboj devas partopreni la menciitan servadon almenaŭ unufoje ĉiujare. Ĉiuj junaj volontuloj devas servi kelkan tempon ĉiujare al la socio por kulturi en si respektemon, helpemon kaj kolektivismon. Laŭ antaŭvido, en 1998 formiĝos en Ĉinio kompare kompleta servo-reto kaj junaj volontuloj aktivados en urboj kaj vilaĝoj.

La junaj laboristoj de la rondoj komercaj, sanprotektaj, publik-sekurecaj k.a. diligente laboras por plena sukceso kaj geknaboj de urboj kaj riĉaj regionoj sin organizas por helpi al geknaboj en malriĉaj regionoj solvi malfacilojn en lernado kaj vivo. La projekto de espero ja estas bona ekzemplo tiuflanke. Oni kolektis monon el la tuta socio por helpi malriĉajn geknabojn, kiuj

ne povis plu viziti lernejon. Sekve de tio, formiĝis en la socio la moro respekti instruistojn, alte taksi edukadon kaj helpi malriĉulojn.

La 11-an de junio 1996 ĉina knabino, alte tenante la torĉon de la 26-aj Olimpikoj, kuradis antaŭ la kaskadego Niagaro, en aplaudado de rigardantoj kun malsamaj haŭtkoloroj. Ŝi, knabino el fora montvilaĝeto, nomiĝis Hu Jingjing (Hu Ĝingĝing). En 1988 ŝia patro perdis laborkapablon kaj ŝia patrino sola vivtenis la tutan familion. 9-jara, ŝi ĉesigis lernadon kaj helpis sian patrinon en dommastrumado kaj kamplaboroj. Pasis unu jaro. Iuvespere ŝia ĉefinstruisto alportis al ŝi stakon da libroj, dirante: "Jingjing, denove vizitu la lernejon. Oni pagis por vi la lernokotizon per la projekto de espero." Nun ŝi lernas en supera mezlernejo.

La projekto de espero estis iniciatita en 1989. Ĝi helpis ne nur Jingjing, sed ankaŭ milionojn da geknaboj de Ĉinio, kiuj ne povis plu viziti lernejon pro malriĉeco. En la pasintaj pli ol 7 jaroj monhelpi al malriĉaj geknaboj, ke ili rehavu la ŝancon viziti lernejon, estis afero atentata de la tuta socio. Ankaŭ la redaktoroj de EPĈ donacis monon kaj objektojn al malriĉaj geknaboj, kiuj ne povis plu viziti lernejon.

Hodiaŭ, la Movado de la 4-a de Majo estas historio, tamen ĝia spirito kuraĝigas la ĉinajn junulojn labori por la bela perspektivo de Ĉinio. ■



Prezentado


# Alilanda burleskula de Sichuan-opera

Teksto kaj fotoj de QI HONG

La 25-jara Mark Branner naskiĝis en Kalifornio de Usono kaj kreskis en Taiwan de Ĉinio. En la infaneco li ekŝatis la ĉinan kulturon. Diplomiĝinte el la teatra fakultato de la Universitato de Los-Anĝeleso, li eklaboris kiel instruisto en la Pedagogia Instituto de Sichuan-provinco, Ĉinio. Foje li spektis Sichuan-operon kaj ekinteresiĝis pri la burleska rolo en la opero. Poste li fariĝis la unua alilanda lernanto en la Sichuan-opera Kolegio de la provinco.

Dum lernado li venkis multajn malfacilojn kaj, unu jaron poste, iris sur la scenejon.

Estas mirinde, ke alilandano ludis rolon de burleskulo en la Sichuan-operoj "Kun brulanta kandelo surkape" kaj "Verkado" kaj tio rikoltis grandan aplaŭdon de la spektantoj.



Sur strato



Lerta ludanto



Burleskulo



Prezentado kun  
brulanta kandelo  
surkape



## Verkoj de muzikistoj-esperantistoj

*ESPERANTO KAJ MUZIKO* (elektitaj artikoloj de muzikistoj-esperantistoj) kompilita de Dimitar Terziev. 14.4 × 20 cm. 75 p.

*MUZIKA TERMINARO* DE M.C. Butler kaj F. Merrick kun *ALFABETA INDEKSO* de D.G. Hill en la supre dirita formato. 30 + 20 p. Ambaŭ eldonitaj de Muzika Esperanto-Ligo, Sofio.

En la unua kajero estas interesa artikolo “Genezo de la popolkantoj” de prof. Stojan Ĝuĝev pri la naskiĝo kaj variado de popolkantoj, artikoloj de D.G. Hill pri Esperanto kaj muziko, pri “La espero”, pri la eminentaj muzikistoj Handel, Bach kaj Scharlatti, artikoloj de D. Terziev pri la infana kanto kaj la internaciisma edukado, la Internacia Esperanto-Ĥoro kaj pri la Muzika Esperanto-Ligo, artikolo de S. Groĥotov pri fama rusa muzikisto S.S. Tanjejev kaj Esperanto, artikolo de K. Zaĥarakis pri ĥora kantado kaj artikolo de D. Lamb pri muziko kaj speciala edukado al handikapaj infanoj. Kvankam nur malgranda kolekto, tamen ĉiuj menciitaj aŭtoroj serioze traktas siajn temojn kaj donas per siaj artikoloj utilajn informojn kaj instigojn al pliprosperigo de la muziko en Esperantujo.

La dua broŝuro estas represo de la “Muzika Terminaro” de M.C. Butler kaj F. Merrick eldonita de Internacia Esperanto-Ligo en 1944 kun aldonita “Alfabeta Indekso” de David Indekso. Kvankam tre simpla kaj truhava, tamen la verketo ankoraŭ povas utili al la muzikaj amantoj en Esperantujo en la nuna tempo. Por fari nian lingvon plenforta en ĉiuj terenoj, kompreneble estas tre dezirinde kompili ĝisdatan muzikan gvidlibron, se ne tiel

ampleksan kiel “The Oxford Companion to Music”, almenaŭ helpopretan por solvi problemojn por esperantigo de muzikaj verkoj nacilingvaj kaj verkado pri muziko. Eldonita literaturo pri muziko en Esperanto montras ĥaoson lingvan.

## Interesa Esperanta lernolibro

*GLOBLINGVO ESPERANTO LERNEBLA EN KVAR HOROJ* verkita de Tsukasa Kobayashi kaj Yoko Hagiwara, eldonita de Hakusuisha Eldonejo (Kanda-Ogawamachi 3-24, Chiyodaku, Tokio, Japanio 101). Formato: 13 × 19 cm. 212 p. Prezo: 24 usonaj dolaroj.

La geaŭtoroj diras interalie: “Kompreneble ni ne kredas ke oni komplete ellernos nian lingvon dum tia mallonga tempo, tamen ni kredas ke oni povos kompreni simplajn frazojn Esperantajn post 4 horoj de la lernado, se oni utiligos bonan tekston aŭ kurson. Unue tiamaniere ni kaptu komencon en la unuaj 4 horoj kiel esperantistoj, poste kreskigu ilin. Tio estas nia taktiko. Ni verkis la libron por inteligentuloj, kiuj jam scias la anglan lingvon kaj plue deziras lerni Esperanton rapide en malmulte da tempo utiligante koncizan memlernolibron.” Ĉar la libro plejparte estas en la japana lingvo, do ĝi celas helpi nur japanojn, kiuj scias la anglan. Tamen la geaŭtoroj esperas, ke la libro estos tradukita en diversajn naciajn lingvojn por helpi disvastigon de Esperanto precipe en Azio kaj Afriko.

La libro estas dividita en tri partojn. Jen la paragrafoj de la unua: “Kio estas E?”, “Kia estis D-ro Zamenhof, kreinto de E”, “Historio de la internacia lingvo”, “Ĉu la angla lingvo estus la internacia lingvo?”, “Historio de E-movado en la mondo”, “Historio de la E-movado en Japanio”, “Evoluo de la Esperanta literaturo”, “Ĉu oni povus esprimi siajn sentojn per la artefarita lingvo?”. La dua parto pri lernado de Esperanto konsistas el jenaj ĉapitroj: “Lernometodo de E.”, “Gramatiko de Esperanto”, “Konversacio en Esperanto”, “El mondfamaj literaturaj verkoj”. La tria parto enhavas vortlistojn orditajn laŭ ofteco, klasifiko, vortspecoj k.a. Je la fino estas listo de legindaj libroj kaj ekzercoj, kies solvojn oni povas trovi en la indikitaj paragrafoj montritaj post la demandoj. Kredeble, tiu ĉi nova lernilo helpas disvastigi Esperanton almenaŭ inter la japanoj.

Recenzis LAŬLUM

# Akvofaloj en Huangguoshu

Teksto de SUN AIJUN

Fotoj de LIU SIGONG

**I**NFANE mi vidis tre belan fonton: profunde de verda valo, la koloran arkajon naskas blanka nebulo kaj ora sunbrilo, akvo falas de montsupro en profundan lageton kaj tuj elfluas el ĝi. Mi memoras la nomon de la akvofalo — Huangguoshu. De paĉjo mi informiĝis, ke ĝi estas la plej granda en Ĉinio, troviĝas en la montaro sudokcidenta kaj estas malfacile atingebla. Tiam mi revis propraokule rigardi ĝin.

En la pasinta somero mia revo realiĝis. Nun vojaĝi tien ne estas problemo. Oni povas facile atingi la lokon, kie fontas la akvofalo, per trajno aŭ aviadilo. Kiam mi venis al la pitoreskejo, jam vesperiĝis, tamen ekster mia atendo mia akompananto promesis akompani min al la akvofalo tuj post vespermanĝo.


Ni proksimiĝis al la valo, en mallumo aŭdiĝis bruego, pro humida aero nebulo kovris mian veston. La akvofalon mi aŭdis, sed ĉu la akva kurteno, honteme sin kaŝanta en lunlumo, estas la grandiozaĵo en la foto, kiu donis neforgeseblan impreson al mi en mia infaneco? Jen inter graciaj arboj orangkolora akvo falis kvazaŭ el la nigra ĉielo en lageton ruĝe brilan — loka turisma servo metis ornamajn lampojn en la pitoreskejo, por ke oni ĝuu la pejzaĝon ankaŭ nokte, do la akvofalo fariĝis ĉefrolo sur la luma scenejo. La versoj de Li Bai, fama poeto de la antikva Ĉinio, tre taŭgas por la vidindaĵo:

*De supr' akvo fluge falas, oh,  
mil metr'  
Ĉu jam Lakta Vojo venis el Ĉiel'*

Matene ni trairis buji-an vilaĝeton kaj ŝtupar-kampojn kaj venis al la grandioza akvofalo, kiun mi vidis antaŭe en la foto. La fluo de la 80-metre larĝa rivero subite falas de 74-metre alta krutaĵo, kvazaŭ miloj da rubandoj. Piede de la akvofalo viciĝas lagetoj, kiujn interligas etaj akvofaloj. Ĉe la mezo de la akvofalo mi en pluvmantelo iris en kavernon kun akva kurteno ĉe la aperturo. Kiam mi eliris el la 134-metre profunda kaverno, mia hararo jam malsekiĝis.




Estas la rivero Baishui, kiu fluas tra montaro de Guizhou-provinco. Ĝi, kvazaŭ mistera drako, jen videbla jen nevidebla,

## Torento



formiĝis en 20 diversajn akvofalojn, el kiuj Huangguoshu estas la plej impona, Doupotang la plej larĝa (105 metroj) kaj Dishuitan la plej alta, kiu konsistas el multŝtupaj akvofaloj kun totala falalto de 410 metroj. Oni ŝajne vizitas “muzeon de akvofaloj”. Parto de Baishui-rivero kaŝiĝas en 4 000-metre profunda karsta kaverno nomata “Draka Palaco”, en kiu oni ĝuas boatadon kaj diversajn stalaktitojn, eĉ akvofalon 34-metre-altan, nomatan “Draka Pordo”.


Vespere mi lernis dancon de mjaŭ-aj gejunuloj. Ĉirkaŭ tendarfajro ni kantis kaj dancis. La gaja kantado kaj la bela tintado de iliaj arĝentaj ornamaĵoj harmoniis kun bruado de la akvofalo, ankaŭ la akvofalo gajas, kvazaŭ ĝi havus vivon. ■





1. Akvofalo malsupren al profunda lageto
2. Huangguoshu-akvofalo
3. Akva kurteno ekster la kaverno
4. Kunfluejo

1	2
3	4



# Informoj pri Hongkong (I)



*La 1-an de julio 1997 Ĉinio restarigos sian suverenecon super Hongkong. Antaŭ tio, ni konigas sinsekve en nia revuo fundamentajn demandojn pri Hongkong, interesantajn niajn legantojn.*

**La Red.**

## **GEOGRAFIA POZICIO, MEDIO KAJ KLIMATO**

Hongkong (22°09'N, 113°52'E-114°30'E) situas ĉe la suda marbordo de Ĉinio, najbare de la urbo Shenzhen, Guangdong-provinco kaj distance de Kanton, ĉefurbo de la provinco, je 130 km. Kun areo de 1 071 kvadrataj kilometroj, ĝi konsistas el pli ol 230 insuloj, el kiuj kompare grandaj estas Hongkong, Kowloon kaj "Novaj Teritorioj". Ili kune kun siaj najbaraj insuletoj formis la tri distriktojn de Hongkong.

La klimato de Hongkong apartenas al tiu de subtropika zono. La kvar sezonoj de Hongkong estas diferencaj. En januaro kaj februaro tie estas plej malvarme kun temperaturo de 15°C, en julio kaj aŭgusto — plej varme, meze je 28°C. En la historio la tiea plej alta temperaturo atingis 36.1°C kaj la plej malalta — 0°C. Kun sufiĉe da sunlumo kaj milda temperaturo, aŭtuno estas plej bela sezono de Hongkong.

Hongkong abundas je montoj. Nun la agroj konsistigas nur 9.4% de la totala areo de Hongkong kaj konstruaĵoj kovras 9.8% de ĝia totala areo.

## **LOĜANTOJ KAJ LINGVOJ**

Hongkong havas 6.31 milionojn da loĝantoj, pli ol 98% el kiuj estas ĉinoj. 59% de la urbanoj naskiĝis en Hongkong kaj la aliaj plejparte venis el Guangdong kaj Fujian (Fugĵian). Krome vivas en Hongkong ankaŭ elmigrintaj ĉinoj kaj civitanoj el la Brita

Konfederacio.

Antaŭe, en multaj jaroj la angla funkciis kiel la oficiala kaj komerca lingvo, en la lastaj jaroj oni ekuzis kaj la anglan kaj la ĉinan. En Hongkong la plej vaste uzata ĉin-lingvo estas idiomo de Guangdong. La loĝantoj en la "Novaj Teritorioj" ĝenerale parolas en Kanton-a, Keĵia (Keĝja)-a kaj Chaozhou-a idiomoj de Guangdong- kaj Fujian-provincoj.

## **HAVENOJ**

Viktorio-Haveno de Hongkong, unu el la tri plej bone naturdotitaj havenoj en la mondo, funkcias kiel grava nodo de mara trafiko en la Ekstrema Oriento. Ĝi, kun areo de 6 000 hektaroj kaj profunda akvo neglacia dum la tuta jaro, havas 150 ankrojojn por 10 000-tonelaj ŝipoj kaj grandaj marŝipoj enakvigantaj je 12m. En la nordokcidento de la haveno troviĝas Kwaichung-doko, la plej granda kontenerizita doko en la mondo. Vespere tie estas ĉarma pejzaĝo, ĉi tie oni povas ĝui ne nur noktajn lumojn, sed ankaŭ mildan marventon. Dank' al la haveno, Hongkong altiris al si multajn turistojn.

Pro disvolviĝo de la haveno kaj praktikado de la politiko de "Libera Haveno", Hongkong ĝuas la famon de internacia komerca centro. Precipe en la lastaj jaroj post kiam Hongkong turnis sian komercadon de la transvenda al la eksporta, la totala valoro de ĝia ekstera komerco konsistigas 1% de tiu de la tuta mondo. Sekve de tio, Hongkong okupas la 13-an lokon en la ekstera komerco de la mondo.

Krome, la multnombraj golfoj de Hongkong abundas je fiŝoj, inter ili estas pli ol 150-specaj altvaloraj marfiŝoj. La plej grava fiŝhaveno portas la nomon Aberdeen. La Hongkong-aj fiŝŝipoj plejparte laboras en la vasta Suda Ĉina Maro. Profitante de siaj naturkondiĉoj, Hongkong disvolvas sian fiŝbredadon, kiu iagrade riĉigis la lokon. ■



# Gajaj drak- kaj leon-dancoj de kamparanoj

Teksto de PANG NAIYING

Fotoj de LIU SIGONG

**E**N la tago, kiam inaŭguriĝis la 4-a Monda Virina Konferenco en Pekino antaŭ du jaroj, dekoj da viglaj “leonoj” bele dancis en akompano de tamburado. Ili saltis inter spektantojn kaj petole distris ilin. Ili subite demetis la “vestojn” kaj, ekster la atendo de la rigardantoj, aperis antaŭ ili kamparaj virinoj.

Ili estis kamparanoj de Beiwu, antaŭurbe de Pekino. En ilia loĝloko oni alte taksas drak- kaj leon-dancojn. Ili multe amuziĝis en la dancado. En morta sezono de kamplaboroj tia amuzado estas nemankigebla por la vivo de la loĝantoj. La Beiwuanoj ekŝatis drak-, leon- kaj *jangge*-dancojn antaŭ kelkaj jaroj. La amuzoj en la komenco tuj altiris al si la atenton de multaj kamparanoj. Dum la drak-danco la viroj dancigis ruĝan drakon, kaj la virinoj la verdan. La du drakoj moviĝis jen supren jen malsupren, kvazaŭ ili flugus en nuboj. Ĝenerale, la drak-dancantoj estas lertaj ankaŭ en leon-danco. Granda leono estas ludata de du homoj. Por ke virleono staru sur la postaj piedoj, la ludanto, kiu sin kaŝas malantaŭe, devas levi sian partneron alten. Malgrandaj leonoj estas ludataj unuope. Ili petole transkapiĝas kaj stulte sin movas. Oni diris al mi, ke la leon-ludantoj en la Monda Virina Konferenco aĝis meznombro 36 jarojn, tamen ili ĉiuj estis bravaj. Post unumonata trejniĝo ili fariĝis sveltaj kaj lertaj en la saltado.

*Jangge*-danco havas du ludmanierojn, t.e. bonzan amuzon kaj ĉaretan amuzon. La bonza prezentas, ke iu vilaĝa sinjoro intencas rompi la budhisan disciplinon. Dum respektoplena saluto al la budha statuo li instigas junan servistinon ŝerci kun bonzo, sed la sinjoro mem estis stuporigita de la bonzo... La ĉareta rakontas pilgrimadon: tie viglas ĉarpuŝanta maljunulo, ĉartiranta servistino, en ĉareto sidas riĉa juna fraŭlino, antaŭ kaj post la ĉareto amindumas riĉaj junaj fraŭloj... Akompanate de tamburado kaj tamtamado, la ludantoj montras sian talenton en la dancado. Oni diras, ke antaŭ la liberigo de la lando la lokon atakis trosekeco kaj oni neniom rikoltis. La

vilaĝanoj devis kun siaj familianoj almozi puŝante ĉareton kaj pilgrimi al budhisma templo por peti favoron de la Budho. La ĉareta amuzo ja estas adaptaĵo bazita sur tia afero. La majstro de la ĉareta amuzo estus 90-jara, se li ankoraŭ vivus. Antaŭe ĉiujare li gvidis la vilaĝanojn danci *jangge*-dancon en templo, tamen li neniam povis sin liberigi el malriĉeco. Nun la 61-jara majstro s-ro Yang diris: “Nun ni vivas pli bone ol antaŭe kaj dancas ekskluzive por amuzado.” S-ino Yang Guiying, kiu ludis la rolon de malbela maljunulino en la ĉareta amuzo, diris al mi, ke antaŭhieraŭ ŝi kun ĝojo aĉetis ĉapon taŭgan por la rolo. Ŝi prenis pilketojn de tablotenisio kiel orependaĵojn. Kun vatita jako kaj loza pantalone ŝi ridis antaŭ spegulo: “Mi ja volas aspekti tiel stulta, por ke ĉiuj ridegu, rigardante mian aspekton.”

La kamparanoj de Beiwu ne estas riĉaj, tamen ili ne plu maltrankvilas pri vestaĵoj kaj manĝaĵoj. Ili ridas nature, senĝene, ĉar ili komprenas, ke bona vivo dependas ne de la budha favoro, sed de scienca terkulturo. La tieaj kamparanoj plejparte pli-malpli lernis en teknika kurso. Ili scias bone grefti, bone zorgi pri forcejaj laboroj kaj profiti de la merkato... tamen iuj ne estas diskretaj en konduto, ili denove dronis en malriĉeco pro hazardludo. Oni sopiras al ideala kultura vivo. Jen pro kio en Beiwu aperis leon-danca trupo el 250 membroj kaj arta taĉmento el 150 membroj. En liberaj tagoj oni dancas, ludas ĉinan ŝakon, faras sportojn kaj aliajn amuzojn... Post tia aktivado la kamparanoj estas tre energiaj en la terkulturado. En kelkaj jaroj la nombro de iliaj plastmembranaj forcejoj kreskis de 3 000 al 8 000.

S-ino Deng Yingjie (Deng Jingĝje), mastrino de muzika familio, nun flegas 3.3 hektarojn da kampoj kaj 10 hektarojn da fiŝcisternoj. Ŝi ankaŭ bredas 23 porkojn. Ŝi aĉetis muzikajn instrumentojn. Ŝi kaj ŝiaj familianoj mem komponas muzikaĵojn, ludas muzikilojn kaj kantas pri novaj aferoj de sia vilaĝo. Ŝia frato diris, ke se ili bone profitos el fiŝbredado en 1997, ili veturigos aŭton aliloken por fari turneon... Nun en Beiwu estas pli ol 20 tiaj familioj.

La Beiwu-anoj estas gastamaj. Maljunulo Zhao Baocun (Ĝaŭ Baŭcun) plurfoje vendis legomojn en urbaj kvartaloj kaj tie li amikiĝis kun urbanoj. Li ĉiujare invitas ilin al la kamparo, por ke ili manĝu akvomelonojn kaj hoku fiŝojn.

En la lastaj jaroj la urbaj artaj taĉmentoj ofte prezentis en vilaĝoj, kaj samtempe la Beiwu-anoj alportis la tradician kulturon al la urbo kune kun legomoj kaj fruktoj. Pro tio nemalmultaj pekinanoj havis ŝancon ĝui ilian dancadon. Oni diris al mi, ke julie de 1997 ili elmontros sin en arta festivalo organizita de ĉin-devenaj britoj. ■



Drak- kaj leon-dancoj



Amuzo en la Printempa Festo



*Jangge-danco*



*Spektatoroj*

## Naskiĝloko de Li Bai

**L**I Bai (701-762) estis granda poeto de Tang-dinastio (618-907) de Ĉinio. Kie li naskiĝis? Tio estas problemo diskutata de multaj jaroj. La artikolo "Li Bai, granda romantika poeto", publikigita en EPC, n-ro 3, 1988, asertas, ke li naskiĝis en Suiye de la Centra Azio, sed en la lastaj jaroj oni prezentis post longjara studo, ke Li Bai naskiĝis en Jiangyou de Sichuan-provinco. Kie naskiĝis Li Bai, tio ne estas grava por ordinaraĵoj, tamen Jiangyou-anoj estas seriozaj pri tio kaj obstinas en tio, ke li naskiĝis en Jiangyou, kiu do fariĝis iom post iom la loko, nepre vizitata de tiuj, kiuj interesiĝas pri serĉado de la postsignoj de la ĉina kulturo kaj pri poemoj de Li Bai.

Jiangyou, ĉirkaŭita de montoj en tri flankoj kaj rivero en la kvara, vere estas tre bela urbo. Ĝuste la ĉarma naturo elkulturis tian talentan poeton, kia Li Bai. Li Bai, alinome Li Taibai kaj Laika Budaano de Qinglian, per sia karaktero liberala kaj senĝena kaj poemoj plenaj de hiperbolo gajnis la publikan admiron generacion post generacio. Li estas honorita kiel la plej granda romantika poeto de Ĉinio. Liaj versoj:

*L' akvo de l' Flava River' venas de l' ĉielo,  
kaj ĝi torentas al la maro sen reveno.*

elspiras arogantecon de la patrino rivero de Ĉinio. La versoj:

*L' hararo je trimil futoj longa,  
Blankiĝis pro malĝojo grandega.*

elverŝas plene lian malĝojon. Kaj la versoj:

*En matenruĝo mi forlasis la monturbon Baidi<sup>1</sup>,  
Ĉe la tagfino alvenas jam Jiangling<sup>2</sup> post mil lioj<sup>3</sup>.*

plene vidigas lian ĝojon. Poemoj de Li Bai estas tradukitaj en multajn lingvojn kiel valora heredaĵo en la monda kultura trezorejo.

Recitante la versaĵojn de Li Bai kaj serĉante liajn spurojn, oni rigardas Jiangyou kiel lian hejmlokon, malgraŭ tio, ĉu li vere tie naskiĝis aŭ ne, ĉar li tie pasigis sian junecon. Inter liaj fruaj poemoj troviĝas la "Vana vizito al la taoisto sur Daitian-monto". La nomita Daitian-

### La Memordomo de Li Bai



monto situas en Jiangyou kaj tie li pasigis siajn lernojarojn. En la poemo la poeto priskribis la lokan pejzaĝon. Jen la poemo:

*Bojad' foj-foj' eĥas lirladon de fonto,  
Kun roso persikfloroj agrable aromas.  
Kaŝiĝas cervo en profunda monto,  
Jam tagmeze l' templa sonoril' ne sonas.  
Sovaĝaj bambuoj ja brumon trarompas,  
Ho, pendas fontfal' sur verda montpinto,  
Neniu scias, kie for taoisto,  
ĉe pinoj sole mi atendas kun tristo.*

Nun la cervo en la monto jam malfacile videblas, tamen la verdaj bambuoj kaj klara fonto restas tiel ĉarmaj, kiel priskribis la poeto antaŭ 12 jarcentoj.


En Jiangyou estas pli ol 30 historiaj lokoj rilate Li Bai. En Qinglian-urbeto, je 15 km fore de la urbo, sidas la "Loĝejo de Li Bai". Tie cirkulas legendo: Foje, kiam la patrino de Li Bai lavis vestojn ĉe la rivereto sude de la urbeto, ora karmo ensaltis en ŝian bambuan korbon. Reveninte hejmen, ŝi kuiris la fiŝon kaj manĝis ĝin, kaj post tio ŝi gravediĝis kaj naskis Li Bai. Komprenoble la legendo ne estas fidinda, tamen ĝi famigis Qinglian-urbeton kaj oni nature asocias ĝin kun la origino de lia alia nomo "Laika budaano de Qinglian". Nemaŭproksime de la "Loĝejo de Li Bai" kuŝas ponteto super rivereto, nomata "Kudrilfrota Rivereto". Oni diras, ke en la infaneco Li Bai vagadis en lernohoroj kaj renkontis ĉe la rivereto maljunulinon, kiu frotis stangeton por havi kudrilon. El tio li ekkonsciis, ke se oni pene laboras, stangeto povas fariĝi kudrilo. La rakonto poste estis kompilita en la elementa lernolibro kaj kuraĝigis multe da diligentaj lernantoj. Komprenoble, ankaŭ Li Bai diligente eklernis. Ekster la "Loĝejo de Li Bai" estas "Penikolava Baseno" kun klara akvo ene. Oni diras, ke la baseno estis uzata de la gefratoj de Li Bai por lavi siajn penikojn.

En la aĝo de 25 jaroj Li Bai forlasis sian hejmon kaj komencis sian turistan vivon. En la vojaĝo li neniam forgesis sian naskiĝlokon. Liaj versoj:

*Antaŭ lito brila luno floras,  
Super tero kvazaŭ prujn' koloras.  
Kapolev': la lunon mi rigardas,  
Kapoklin': nasklokone mi memoras.*

trafe montras lian nostalgion. Ankaŭ Jiangyou-anoj ne forgesis lin. Memore al li, ili konstruis "Memordomo de Li Bai". En la domo pli ol 30 antikvastilaj konstruaĵoj kontrastas kun la ĉielskrapantaj antikvaj arboj. Sur ĝia fronto okulfrapas la vortoj "Memordomo de Li Bai". Meze de la ĉefa halo sidas kliniĝinta statuo de Li Bai. Trans la koridoro estas kvieta "Legoĉambro de Li Taibai", en kiu eksponeblas altvaloraj objektoj pri la poeto, kiaj kaligrafiaĵoj, pentraĵoj kaj esploraj materialoj pri Li Bai. Nun en Jiangyou ne nur estas oficiala instituto de Li Bai, sed ankaŭ ofte okazas landaj kolokvoj, kaj en ĉiu sesa jaro okazas internacia kolokvo pri Li Bai. ■

1. Baidi, antikva monturbo en la nuna Sichuan-provinco
2. Jiangling, antikva urbo en la nuna Hubei-provinco
3. Lio, unuo de longo en la ĉina sistemo, egalas al 0.5 km.



# Fascinanta Dunhuang (I)

Teksto de PANG NAIYING

Fotoj de HAN HONG

**V**ETURINTE de la pasejo Jiayuguan okcidenten 360 km sur la dezerto, nia aŭtobuso atingis la urbon Dunhuang en la okcidenta ekstremo de la Koridoro Okcidente de la Flava Rivero. En la buso estis alilandaj geedzoj. Ili montris sian notlibron, en kiu legiĝas ĉinlingvaj ideogramoj, al ĉina virino por konsulti. Ŝi legis “Ni veturas al...” La ĉinino ankoraŭ ne finis la legadon, kiam la geedzoj konkure laŭte diris la vorton “Dunhuang”, starigante la dikfingron. Je tio eksplodis rido en la aŭto.

Ĉiuj, ĉu ĉinoj ĉu alilandanoj, prenas Dunhuang kiel sian komunan celokon, se ili vojaĝas laŭ la Silka Vojo.


## ETERNA FASCINO


Dunhuang, vestita verde kaj ĉirkaŭita de dezerto, prosperis en historio. En 111 a.K. estis starigita la prefektujo Dunhuang, okcidente de kiu estis Xinjiang kaj mezaziaj landoj, tiel ke Dunhuang fariĝis trafika centro siatempe inter Ĉinio kaj Okcidento. En Tang-dinastio (618-907) la Silka Vojo atingis plenan prosperon de komercado kaj tiam en la prefektujo kolektiĝis multaj komercistoj. En la urbo funkciis specialaj instancoj por akcepti kaj fikslogigi ilin. Viglis bazaroj de la mateno ĝis la vespero. Ĉinaj komercistoj vendis silkaĵojn, por-

celanaĵojn kaj teon, dum la alilandaj agaton, jadaĵojn kaj pelton. Ofte vidiĝis la scenoj, ke hindaj artistoj prezentis programerojn kune kun dresitaj elefantoj kaj leonoj kaj prestidigitis surloke, Dunhuang-anoj vendis etmanĝaĵojn, ĉinaj rakontistoj rakontis historiojn kaj alilandaj misiistoj predikis religiojn.


La antikva urbo Dunhuang allogas pli kaj pli multajn ĉinajn kaj alilandajn turistojn per siaj vidindaĵoj, kiaj Wowachi(Ŭoŭaĉi)-lago, el kiu trinkis laŭlegende “ĉielaj ĉevaloj” 2 000 jarojn antaŭe, Bruanta Sablomonto, Lunarka Fonto kaj Mogao-ŝtonkavernaro (Milbudha Ŝtonkavernaro). Laŭ statistiko, la nombro de ĉinaj kaj alilandaj turistoj, kiujn akceptis Dunhuang, kreskis je

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO






**Bruanta Sablomonto**



**Parašuta glisado super la dezerto**



**Ĉe budo de turismaj  
memorajoj**

**Lunarka Fonto**



30% ĉiujare ekde 1990.

## FONTO DE LA VIVO

Dunhuang situas en profundo de dezerto. Tie, ĉirkaŭ vilaĝoj kaj kampoj, apud kanaloj kaj vojoj, kreskas poploj en du vicoj. Dikaj trunkoj formas muron kaj branĉoj kaj arbedoj sub la poploj verdan kurtenon. Lokano diris, ke antaŭe en Dunhuang ventis tutjare, sed nun, dank' al forstoj, la rapido de vento malkreskis de 2.4 m/sek. al 1.9 m/sek. kaj sabloŝtormo atakis ĉ. ok tagojn jare, duone malpli multe ol en la pasinteco.

En la urbo ĉie estas budoj de fruktoj. La tieaj vinberoj kaj melonoj estas tre ŝatataj, precipe la tieaj retmelonoj estas bonodoraj kaj sukeroriĉaj. Tial la loko estas honorita kiel melona urbo.

Danghe-rivero, kiu fontas el Qilian-montaro, nutras la urbon. Por malebligi dezertiĝon de la trafika centro la antikvuloj faris ĉion eblan. Historia materialo diras, ke en Tang-dinastio estis konstruitaj tie 37 kanaloj, en la prefektujo laboris ŝtatoficisto pri akvoutiligo kaj estis ellaborita kompleto da leĝoj pri akvoutiligo. Dank' al plena utiligo de la rivero, plialtiĝis la grena produktokvanto, kiu ne nur kontentigis la bezonon de la prefektujo, sed ankaŭ transportiĝis al aliaj lokoj de Ĉinio.

Ni atingis Nanhu-distrikton kaj tuj rapidis al Wowachi-lago, kiu ricevas akvon el degelinta neĝo de Qilian-montaro. Per la akvo lokanoj irigacias vastan vinber-ĝardenon. Ili diris, ke la irigacia kanalo estis konstruita de antikvaj ĉinoj.

## BRUANTA SABLONMONTO KAJ LUNARKA FONTO

La Bruanta Sablomonto majestas pro siaj ondantaj pintoj, kio donas pitoreskan pejzaĝon.

Estis tre malfacile surgrimpi la krutan sablomonton. Tamen turistoj ĉiamaniere klopodis por grimpi sur ĝin kun la celo aŭskulti bruon de sablo. Tiu scivolemo aperis jam en la antikveco: La 5-an de la 5-a monato laŭ la ĉina lunkalendaro, Dunhuang-anoj surgrimpis la monton kaj iom poste kune malsupren glitis, kio donis tondran bruon aŭdeblan malproksime. El historiaj materialoj estas konate, ke iam okazis, ke la sablomonto muĝis somere, kaj ke nokte sur la monto videblis buntaj fajreroj. Bedaŭrinde, nun ne plu vidiĝas tiaj fenomenoj.

La loĝantoj de Shashan-vilaĝo proksime de la Bruanta Sablomonto vivtenas sin per turisma afero kaj ĉiuj familioj bredas kamelojn je dispono por turistoj. Tagmeze la temperaturo sur la monto atingas 40°C kaj multaj reŭmatismuloj tiam venas sur la monton por fari sabloterapion.



Figuroj sur vakstinkturita ŝtofo



Strato de Dunhuang



**En rikolta sezono de vinberoj en Dunhuang**




**Antikva irigacia kanalo**





**Prezentado en Dunhuang**



**Vespera foiro**

La Lunarka Fonto kviete ripozas en la sino de la Bruanta Sablomonto. Kiam brilas sur la ĉielo la lunarko, en la fonto ĉiam speguliĝas ĝia bela bildo. La fiŝoj kaj herboj en la fonto estas oficinale uzataj kaj pro tio ĝi portas la alian nomon Farmacia Fonto.

Ĉe la fonto staris antikva templo, el kiu aŭdiĝis sonorado matene kaj tamburado vespere. Poste, ĝi estis englutita de flusablo. Okcidente de la fonto maljuna monaĥino loĝas en kaduka domo. Dekojn da jaroj antaŭe, kiel oni diris, ŝi edziniĝis kaj havis infanon, sed ne estas sciata, kial ŝi monaĥiniĝis. Mi kun scivolemo iris viziti ŝin. Kvankam ŝi jam estas kaduka, tamen beleco ankoraŭ videblas sur ŝia vizaĝo. Ŝi diris al mi, ke antaŭ kelkaj jaroj ŝin trafis kancero kaj ŝi tamen ne mortis, ĉar ŝi ankoraŭ ne finplenumis la voton pri riparado de la templo. Ĉiutage post sutrorecitado ŝi descendas la monton por forpreni forĵetaĵojn ĉe la fonto. Ŝi proponis al mi tason da teo, dirante: “Ĝi estas infuzita en la font-akvo.” La bongusta teo pensigis min, ke tiu ĉi maljunulino transvivis la malsanon eble dank’ al la akvo.

Plej mirindas, ke la Lunarka Fonto, kvankam ĉirkaŭita de flusablo, estas neniam englutita de ĝi. Historia materialo konigas, ke en Dunhuang kvankam ofte ventis kaj la sablomonto moviĝis, tamen la sablo neniam atakis la fonton. Kaj plie, en la dezerto, kie la vaporokvanto estas 60-oble pli granda ol la pluvokvanto, la fonto neniam sekigas. Kiam mi forlasis la Bruantan Sablomonton en vespera krepusko, ekleviĝis sablo-vento de la montvalo al la montsupro. Mirinde, sableroj ne falis en la fonton!

## EN VESPERA FOIRO

La nomita foiro estas fenestro por koni Dunhuang.

Ĝi lokiĝas ĝuste sur sidejo de antikva bazaro. Por ree prezenti la antaŭan imponecon Dunhuang-anoj konstruis tie elegantan arkadon imite al tiu de Tang-dinastio. Ambaŭflanke de ĝi staras po unu grandioza ceramikaja fresko, kun la titoloj “Komerco en Tang-dinastio” kaj “Sur la Silka Vojo”. Ŝajnis, ke la antikva komerco daŭras sur la budoj de gemoj kaj juveloj antaŭ la freskoj. Sub fluoreskaj lampoj brilis diversaj komercaĵoj: kristalaj okulvitroj de Dunhuang, jadaj kapkusenoj de Xinjiang, arĝentaj pokaloj de la Interna Mongolio, lakto-kruĉoj de Tibeto, kolĉenoj de Birmo, tali-tranĉiloj de Nepalo kaj juveloj de Hindio. Plej plaĉis al mi paro da delikataj tintiletoj. Je tuŝeto ili eksonis agrable kun oreplaca eĥo. Mi kun plezuro aĉetis ilin kiel memoraĵon.

La 18-jara Ma, ĉiujare transportas buteron el sia loko al Tibeto kaj vendas ĝin por aĉeti tie religiajn muzikilojn, kiaj korno, sonorilo kaj preĝrado, kuprajn akvokruĉojn kaj arĝentajn braceletojn, tre ŝatatajn de alilandaj turistoj. Butero estas facile vendebla en Tibeto, ĉar la tieaj temploj uzas buterajn lampojn kaj kultas budhostatutojn per buteraj floroj. En Lhasa li bone rilatas kun tibetaj paŝtistoj kaj bonzoj kaj kun komercistoj en Hindio kaj Nepalo. Ne timante longan vojon, li komercas ĉefe por aĉeti nepalajn peltojn en Tibeto, el kiuj li faras vestojn kaj vendas ilin en Dunhuang. Kompreneble, nun nemalmultaj, kia Ma, vojaĝas laŭ la Silka Vojo por fari komercadon.

Preskaŭ ĉiuj sidlokoj en tetrinkejo estis okupitaj. Vespere urbanoj post taga laboro kaj turistoj, laciĝintaj de la grimpo de Bruanta Sablomonto, vizitis la tetrinkejon. Apud la fontano kun buntaj akvo-radioj ili sidas en apogseĝo, manĝante baktajn melonosemojn kaj ĝuante muzikon.

De iu manĝaj-budo aŭdiĝis bruoj de drinkantoj en fingr-divena ludo. Drinkemaj Dunhuanganoj sin amuzas per tia ludo. En la gubernia kroniko tekstas: “Pro ekonomia prospero la Dunhuang-anoj vivis kompare luksan vivon. Bele vestitaj, ili ofte festenis kun multaj drinkaĵoj...”

La budoj proponas manĝaĵojn kun diverslokaj gustoj de Ĉinio. Tie oni povas ĝui la sukcon de la ĉina dieta kulturo.

La tieaj budoj plejparte estas entreprenataj de geedza paro. Mezaĝa Li Zhi kaj lia edzino proponas ekskluzive viandon preparitan en fajenca poto. La negranda fortika poto similas al antikva fajencaĵo. Ĉiuj potoj metiĝas sur milda fajro. Kiam bone stufiĝas la viando, la mastro tenaĵle portas la poton al kliento.

Li Zhi diris: “Alilandanoj, precipe japanoj, ofte vizitas mian budon. Kiam ili venas, mi balbute alparolas ilin japane, tio povas allogi al mi pli da klientoj.”

Samkiel aliaj pli ol 600 budoj en la urbo, ankaŭ tiu de Li Zhi estas multe vizitata. Ĉiutage, kiam ili finas sian laboron, regas jam profunda nokto. Hejmen reveninte, ili devas prepari sin por la morgaŭa laboro. Je la tria aŭ kvara matene ili enlitiĝas kaj je la naŭa matene ili komencas labori en la budo. Li Zhi diris: “El laco venas plezuro por ni. Ni tre ĝojas, se nia servo kontentigas la klientojn.” Montrante fingre al la blanka ĉapo sur sia kapo, li daŭrigis: “Ĝi, farita de mi mem, estas atesto de duaklasa kuiristo.”

Fakte, Mogao-ŝtonkavernaro allogas pli ol la urbo Dunhuang mem. Ĝi estas arta paradizo, kiun mi vizitos dum mia sekva vojaĝo. ■



# Primitiva terkultivado per fajro kaj tranĉilo

de ZHU JIANG

**E**N Ĉinio cirkulas popoldiro: “La popolo estas fundamento de la ŝtato kaj nutraĵo — ĝia unua bezono”. Tio signifas, ke agrikulturo, kiu provizas la popolanojn per vestaĵoj kaj nutraĵoj, estas fundamento por trankviligi la popolon kaj firmigi la ŝtaton. Kiam do estiĝis la ĉina agrikulturo?

## YANDI KAJ PLUGILO

Ĉinoj rigardas Yandi kaj Huangdi kiel siajn prapatrojn. Legendo diras, ke antaŭ ĉ. 5 000 jaroj ĉinoj jam sciis kulturi iujn grenojn. Vidante, ke oni peneme plugas per simplaj laboriloj, Yandi ofte meditis pri plibonigo de la laboriloj. Foje, li senintence metis sian manon sur teron, ĝin enpremis kaj puŝis antaŭen, rezulte de tio aperis profunda kaj rekta sulko. Sugestite de tio, li elfaris plugilon, la plej fruan de Ĉinio.

Historia materialo notas, ke Yandi elfaris ankaŭ hojon kaj ŝpaton. Li instruis popolanojn plugi teron kaj oni kultis lin kiel dion de terkulturado. Inter la skulptaĵoj de Han-dinastio (206 a.K. - 220 p.K.) en Wuliang-templo de Shandong-provinco troviĝas bildo de Yandi, kiu plugas per dudenta hojo.

## ARKEOLOGIAJ ELTROVOJ

Oni povas diri, ke agrikulturo estas la unua produkta aktivado, kiun oni konscie faris por reformi la naturon. Ĝi naskiĝis multe pli frue ol la skriba lingvo, kaj la origino de la ĉina agrikulturo, atestita de ĉinaj arkeologoj, estas multe pli frua ol tiu laŭ la popoldiro.

En la komenco de la 50-aj jaroj ĉinaj arkeologoj prifosis ruĥnon de la primitiva vilaĝo Banpo en Xi'an, Shaanxi-provinco, en la baseno de la Flava Rivero. La prifosado montris, ke jam antaŭ pli ol 6 000 jaroj ĉinaj prauloj faris hakilon, ŝovelilon, tranĉilon, plugilon, muelilon k.a. el ligno, ŝtono kaj bestaj ostoj. En la ruĥno oni trovis ankaŭ argilan poton, en kiu konserviĝas milio-grajnoj kaj legomsemoj, kaj vilaĝon kun homaj loĝejoj kaj porkejoj.



Cinozuroj

En 1973 ĉinaj arkeologoj prifosis la ruĥnon Hemudu en Yuyao-gubernio, Zhejiang-provinco. Tie oni trovis grandnombrajn ostajn sokojn, ŝtonajn hakilojn kaj duonmetre dikan tavolon da rizo, ĝiaj ŝeloj kaj folioj. Tio pruvas, ke antaŭ 7 000 jaroj ĉinaj prauloj jam povosciis terkultivadon. En alia ruĥno en la suda parto de Ĉinio, oni elfosis en kalkŝtona kaverno ŝtonan hakilon kun ligna tenilo, konkan tranĉilon, ŝtonan stangeton, muelŝtonon kaj ruĥnon de grandnombraj graminoj, kiuj montras, ke jam estis primitiva agrikulturo antaŭ ĉ. 10 000 jaroj en Ĉinio. En la kaverno oni trovis ankaŭ fosiliojn de breditaj porkoj, ostojn de sovaĝaj bestoj kaj pli ol 180 specojn de praaj vegetaloj. Tio pruvas, ke tiutempe kolektado kaj ĉasado estis pli gravaj ol agrikulturo en la homa vivo.

Juĝate laŭ la historia evoluado de agrikulturo, la agrikulturo en la ruĥno apartenis al tiu en la etapo de “kultivado per fajro kaj tranĉilo”, la plej malalta etapo de agrikultura produktado, en kiu la kampo estis unufoje plantita. La ruĥnoj Hemudu kaj Banpo montris, ke tiam la kampo estis plugita, ordigita kaj plurfoje priplantita. Tio estis la komenco de “kultivita tero”.

## RAKONTO PRI CINOZURO

Promenante sur kampo, oni ofte vidas herbojn kun spikoj malpli grandaj ol tiuj de milio, oni nomas ilin cinozuroj. Milio estis reformita de la prauloj el cinozuro. Ĝi estas unu el la plej fruaj agrikulturaj plantoj de Ĉinio. Antaŭ pli ol 8 000 jaroj ĉinaj prauloj jam komencis ekspluati fekundan, virgan teron ĉe la Flava Rivero. Ili falĉis herbojn kaj hakis arbojn per ŝtonaj hakiloj kaj tranĉiloj, plugis la teron per ŝtonaj ŝoveliloj kaj hojoj kaj fine dissemis milion. Kiam la plantoj

maturiĝis, ili detranĉis iliajn spikojn per ŝtonaj falĉiloj, ilin sunumis kaj senŝeligis per ŝtona muelilo. Oni kuiris la grajnojn por manĝi.

Dank' al cinozuro rapide evoluis la agrikulturo ĉe la meza kaj malsupra basenoj de la Flava Rivero, plialtiĝis la grena produktokvanto kaj kreskis la loĝantaro. Sekve aperis multaj praaj vilaĝoj sur la Nordĉinia Ebenaĵo kaj la Ebenaĵo de Weiherivero.

## HOU JI, LA UNUA AGRIKULTURA OFICISTO DE ĈINIO

En la prahistorio la ĉinaj prauloj ĉefe kulturis milion en la nordo kaj rizon en la sudo. Milio estis sankta en la okuloj de la ĉinaj prauloj kaj okupis la unuan lokon inter la cerealoj. La unua agrikultura ŝtatificisto de Ĉinio nomiĝis Hou Ji (Hoŭ Ĝi). "Ji" signifas "milio" en la ĉina lingvo.

Legendo diras, ke antaŭ pli ol 4 000 jaroj estis knabo nomata Qi (Ĉji). Malgranda, li povis semi fabojn en teron. Plenkreskinte, li povosciis distingi diversspecan teron, elekti grandajn kaj pezajn semojn por ilin semi en la teron. Dank' al lia diligenco, la de li kultivataj plantaĵoj ĉiam kreskis prospere kun plenaj spikoj kaj donis riĉan rikolton. La tribestro Shun nomumis lin agrikultura oficisto. Sub lia gvido oni riĉe rikoltis. Poste okazis inundo, li do helpis al la popolanoj transloĝiĝi al sekura kaj kultivebla loko. Tie li gvidis ilin en kultivado de grenplantoj kaj tiele oni evitis malsaton. Post la morto de Qi, liaj posteuloj transloĝiĝis en la regionon de nordokcidenta Ĉinio. Tie ili daŭre koniĝis al la lokanoj sian kultivan sperton. Dank' al tio la tiea agrikulturo disvolviĝis kaj la popolanoj ĝuis bonhavan vivon. Ekde tiam en ĉiuj dinastioj de Ĉinio instaliĝis agrikultura oficisto.

## EVOLUADO DE TERKULTIVADO

Ĉinaj prauloj uzis lignajn, ŝtonajn, ostajn kaj konkajn agrikulturajn instrumentojn milojn da jaroj, kaj nur post la 14-a jc. a.K. ili ellernis fari bronzon kaj iom post iom aperis bronza agrikulturiloj, kiuj estis pli firmaj ol tiuj el ligno kaj ostoj, kaj pli facile fareblaj kaj malpezaj ol tiuj el ŝtono. Tamen bronza agrikulturiloj estis malmultaj pro malfacila trovebleco de krudmaterialoj.

Antaŭ 2 500 jaroj feraj agrikulturiloj, ĉefe la lignaj kun fera klingo, estis vaste uzataj. En 206 a.K. — 220 p.K. fera industrio impetis, feraj agrikulturiloj populariĝis, sekve la agrikultura produktiveco multe leviĝis.

Bova plugado aperis pli frue ol la fera agrikulturilo, tamen ĝia populariĝo estis malpli frua ol la

lasta. Plugado per brutoj antaŭenigis la praan agrikulturon. Sur freskoj en la tomboj de Han-dinastio en kelkaj provincoj de Ĉinio estas bildoj de bova terplugado. Tia plugado nun ankoraŭ estas videbla ie en Ĉinio.

## AGRIKULTURO NOTITA PER SKRIBAJ SIGNOJ

En la longa historio de la ĉina agrikulturo oni akumulis multajn valorajn spertojn. Resumi tiujn spertojn ĉiam estis la komuna deziro de kamparanoj kaj oficistoj de Ĉinio. Ekde la naskiĝo de la skriba lingvo oni multe faris verkojn pri teorio kaj metodoj de agrikultura produkto.

Antaŭ pli ol 3 000 jaroj la ĉinaj prauloj jam gravuris sur testudŝeloj kaj bestostoj figurojn de rizo, milio, hordeo k.a. kaj hieroglifajn surskribojn pri agrikulturaj instrumentoj kaj kultivado, kiaj plugilo, kampo, puto kaj bedo.

Antaŭ 2 600 jaroj, t.e., en la periodo de Printempo kaj Aŭtuno, skribaj notoj perfektigis iom post iom. Bedaŭrinde, la plej fruaj agronomiaj libroj de Ĉinio jam perdiĝis, kaj nun legeblas nur 4 disertadoj, kiuj traktas pri la graveco de agrikulturo por la ŝtato kaj popolo kaj pri diversaj agronomiaj teknikoj. Tio fundamentis formiĝon de la ĉina agrikultura tradicio, nome profunda plugado kaj zorgema kultivado.

En pli ol 2 000 jaroj niaj prauloj heredigis al ni pli ol 300 agronomiajn verkojn. Oni povas diri, ke Ĉinio sukcesas vivteni 22% de la monda loĝantaro per 7% de la monda agraro, tio nedisigeblas de la heredaĵoj. ■

## Anonco

Ekde la januara numero de nia revuo, 1997, en kiu ni komencis la konkurson pri "Fotoj Faritaj de E-istoj", ni ricevis belajn fotojn faritajn de niaj legantoj. Ĉar ni premios nur tiujn fotojn, kiuj estis kaj estos publikigitaj en la numeroj 1-12, 1997, konkursantoj sendu al ni siajn fotojn kiel eble plej baldaŭ, por ke ni publikigu ilin en 1997.

Ni daŭrigos la rubrikon "Fotoj Faritaj de E-istoj". Ni atendas fotojn pri pejzaĝo, moro, festo ktp.

La Red.

# Novgeneraciaj reĝisoroj de ĉinaj filmoj



Hu Xueyang, heroo de la filmo "Mergiginta Juneco"

**I**LI estas ĉ.-30-jaraj reĝisoroj debutintaj en la 90-aj jaroj kaj nomataj sesgeneraciaj reĝisoroj de Ĉinio, ĉar antaŭ ili viglis sur la areno de ĉinaj filmoj

la kvinageraciaj reĝisoroj diplomitiĝintaj el la sama kinematografia instituto. Inter ili estas s-roj Zhang Yimou, Chen Kaige kaj aliaj, kiuj reĝisoris la filmojn

"Alte Pendas Ruĝaj Lanternoj" kaj "Leŭsa Tero" sensaciantajn la arenon de mondaj filmoj. La kvinageraciaj reĝisoroj estas neignoreblaj en Ĉinio, kies filmoj spertas transiĝon al merkato. La realaj kondiĉoj senigis multajn senfamajn junulojn je ŝanco fari reĝisoradon, sekve de tio, ili ne debutis kiel kolektivo kaj al ilia arto mankis la klara kaj unuigita stilo, kiun posedas la kvinageraciaj reĝisoroj. La de ili reĝisoritaj filmoj elspiras individuecon kaj diversecon. Oni ĝenerale nomas ilin novgeneraciaj reĝisoroj anstataŭ la sesageraciaj, malgraŭ tio ili alportas ion freŝan al ĉinaj filmoj.

Inter la novgeneraciaj reĝisoroj s-ro Hu Xueyang estas feliĉa. Li diplomitiĝis el kinematografia instituto en 1989 kaj en la sekvanta jaro li reĝisoris unuafoje la filmon "Atendanta Sinjorino", kiu estis prezentita en 1991. La filmo priskribas grupon da homoj en la ĉina socio, kies edzoj aŭ edzinoj studas alilande. Heroino Nai Qing kun malpacienca atendo atendis sian edzon, kiu studis en San-Francisko jam kvar jarojn. Nun ŝi konatiĝis kun s-ro Jia Dong, kies edzino studas ankaŭ alilande. En la komuna atendo ili enamiĝis unu al

la alia. Sed ekster ilia atendo la edzino de Jia Dong revenis en Ĉinion. Spertinte la grandan malĝojon, Nai Qing flugis al Usono. El la spertoj de multaj atendantaj virinoj ŝi ŝajne konsciis, ke ŝia edzo jam apartenas al alia virino.

Ekde la 80-aj jaroj en Ĉinio kelkfoje okazis, ke multaj homoj veturis alilanden por studi, kio kaŭzis, ke la vivo kaj aliaj problemoj de la atendantoj vekis la publikan atenton. La filmo aŭtentike montras iliajn internan kontraŭdiron, malĝojon kaj malfacilon por sin liberigi el tio. La filmo ne nur estis proponita kiel debuta verko de la plej eminenta reĝisoro gajninta la Premion Ora Koko, la plej altan premion de la ĉinaj filmoj, sed ankaŭ honorita per la granda premio Piramido en la 16-a Internacia Filma Festivalo de Kairo, kaj pro tio s-ro Hu Xueyang estis multe atentata.

De la fino de la 80-aj jaroj ĝis la komenco de la 90-aj jaroj la filmoj reĝisoritaj de tiuj novgeneraciaj plejparte estis dokumentaj. Pro diversaj kaŭzoj ili ne estis prezentitaj. En 1994 estis prezentita la filmo "Hirtiĝis la Haroj" reĝisorita de s-ro Guan Hu. Post tio sekvis nombro da novaj filmoj, reĝisoritaj de la novgeneraciaj, kiaj "Knabino en Krizo" reĝisorita de Lou Ye, "Brila Jaro" reĝisorita de A Nian kaj "Venkinto" reĝisorita de Huo Jianqi (Hŭo Ĝjanĉji). Ĝuste pro tio ekfamigis la novgeneraciaj reĝisoroj.

"Hirtiĝis la Haroj" estas filmo sur la fono de modernaj junuloj kaj rokmuzika vivo. Ĝi montras la individuecan penadon de la novgeneraciaj filmistoj. Malsame ol la filmoj, kiujn kreis la kvinageraciaj reĝisoroj por prezenti historiajn scenojn kaj naciajn fablojn internacie, la novgeneraciaj dediĉas sian grandan atenton al la

juneco kaj vivo sur la fono de modernaj urboj. La filmo rakontas la historion pri renkontiĝo de studentino de medicina instituto kaj ŝiaj kunlernantoj post longaj jaroj. Ĝi komenciĝas de la rememoro de la heroino, tamen sen kompleta intrigo. Ĝi montras bagatelojn kaj sentimentojn en la vivo pere de kelke da sporadaj aferoj, tiel ke ĝi konigas la malĝojon kaj maltrankvilon elteneblajn por la gejunuloj. Konforme al tio, aperas ritme drasta rok-muziko kaj planoj de MTV, tiel ke tiu filmo estas envolvita per rapidaj ritmoj. Jen pro tio la filmo elspiras fortan epokan etoson.

La sekvantaj filmoj reĝisoritaj de la novgeneraciaj, kvankam havantaj malsamajn stilojn, montras, ke ili atentis ĉefe la junecon kaj urban vivon. La filmoj montras la malĝojon kaj maltrankvilon de la modernaj gejunuloj, ilian ordinaran vivon pere de priskribo de apartaj sociaj fenomenoj post ekpraktikado de reformado kaj pordmalfermo aŭ ilian aspiron al kariero kaj amo. Tiuj filmoj estas "Ĝeamantoj en Semajnfino" de Lou Ye, "Mergiĝinta Juneco" de Hu Xueyang kaj "Venkinto" de Huo Jianqi.

"Ne Turnu Vin al Mi post Nia Eksedziĝo" reĝisorita de Wang Rui estas adaptaĵo de samtitola dramo. Heroo Li Haoming estis laboristo. Li ekzigis, sen scio de sia edzino. Li aĉetis komputilon kaj absorbite sin okupis per verkado kun forta deziro fariĝi verkisto. Ĉion ĉi tion forte malaprobis lia edzino Shi Hui. Ŝi decidis eksedziniĝi kun li. Shi Hong, fratino de Shi Hui, ŝanĝis sian loĝejon kontraŭ tiu de la lasta kaj vidis en Li Haoming aspiron al pli alta celo. Li Haoming fariĝis verkisto tre ŝatata de la legantoj. Shi Hui ekvolis reedziniĝi al li. Ŝia deziro estis vaste konata. Antaŭ tio Li


Haoming ŝanceliĝis en sia amo al Shi Hong. Rimarkinte tion, Shi Hong dronis en granda malĝojo... La filmo priskribas la psikologian ŝanĝigon de ĉinaj gejunuloj en la tempo, kiam la ĉina socio alfrontas merkatan ekonomion, kaj la amaj kaj geedziĝaj konceptoj de la ĉinoj multe ŝanĝiĝis sub la nova cirkonstancaro. Pro tio la filmo fariĝis tre ŝatata komence de 1997.

S-ro Jiang Wen estas rimarkinda persono el la novgeneraciaj reĝisoroj, ĉar li iris vivojn malsaman ol tiu de aliaj reĝisoroj de la sama generacio. Jiang estas juna aktoro diplomitiĝinta el la prezenta fakultato de dramaturgia instituto. Li aktoris en la filmo "Ruĝa Sorĝo" reĝisorita de Zhang Yimou kaj famiĝis tra la tuta lando. Poste li aktoris ankaŭ en pluraj filmoj premiitaj internacie, kia "En la Jaro de Malbona Fortuno". En 1994 li reĝisoris unuafoje la filmon "En la Brilaj Tagoj". La filmo temas pri la vivo de junuloj en la 60-aj jaroj, kiam Ĉinio spertis la katastrofon de la tiel nomata kultura revolucio. Ĝi diferencas de multaj aliaj samtemaj filmoj, kiuj malkaŝas nur la malĝojon en tiuj apartaj jaroj, kaj montras la naivecon de aro da senbridaj gejunuloj. Por la gejunuloj tiuj jaroj estis en konstanta tumulto, tamen plenaj de sunaj lumoj. Tiu ĉi filmo estas laŭdata de la en- kaj eksterlandaj filmistoj. Mezlernejano Xia Yu estis premiita per pokalo de la plej bona ĉefrolulo en la Venecia Filma Festivalo.


Estas vere, ke la novgeneraciaj reĝisoroj antaŭ nelonge debutis en la ĉina filmista rondo. Pluraj el ili reĝisoris filmon unuafoje. Tamen ĉinaj rigardantoj donas sian apartan atenton al ilia kreskado, ĉar ili alportas novan fizionomion al la ĉinaj filmoj. ■




Jiang Wen (maldekstre) kaj la ĉefrolulo de filmo de li reĝisorita





Huo Jianqi kaj sceno el la de li reĝisorita filmo "Venkinto"







Lou Ye kaj sceno el la de li reĝisorita filmo "Knabino en Krizo"



Guan Hu (meze) rakontas al geaktoroj pri filmado.

# Pri “familia investo” de ĉinoj

de JI PING

**A**NTAŬE, ĉinoj deponis ŝparmonon eĉ malmultan senescepte en banko. Sed nun, ili havas multajn aliajn manierojn uzi la monon, dank’ al la starigo de la sistemo de socialisma merkata ekonomio kaj de la financa merkato.

## ŜANĜO DE LA KONCEPTO PRI “INVESTO”

De la lastaj monatoj Li Hongtao, kiu laboras en Pekino, pensadas, kiel disponi ŝparmonon. Li laboris pli ol 20 jarojn. Pasintece, pro la politiko pri malalta salajro kaj distribua egalismo, li ricevis monatan salajron de malpli ol 100 juanoj

(unu usona dolaro tiam egalis ĉ. du juanojn). Kvankam ŝparrema, li povis deponi en banko nur malmulte da mono. En la lastaj jaroj li kaj lia edzino estis multe pli salajritaj ol antaŭe. Krom elspezo por ĉiutaga vivo, ili havis pli grandan sumon da ŝparmono. Tiukaze li komencis pensi, kiel profiti de la ŝparmono. Nun estas pli da vojoj de investado, ekz., aĉeti obligacion, akcion kaj asekuran bilon. Kaj plie, pro prezaltiĝo en la lastaj jaroj la Ĉina Popola Banko kompensis la perdon de la deponantoj kaŭzitan pro inflacio. En la pasinta jaro ĝi nuligis la kompenson kaj dufoje malaltigis interezon de deponi-

ta mono pro stabiliĝo de prezoj.

Fakte, kiel s-ro Li, ankaŭ multaj aliaj ĉinoj pensas la samon. Ili jam ne plu hontas paroli pri produktivemo de mono kaj interezo. Laŭ ili, mono ne nur uziĝas por aĉeti vivbezonaĵojn, sed ankaŭ estas kapitalo multe produktiva en investo.

## ŜPARLOKADO — PLEJ VASTE ELEKTATA

Post nuligo de la kompenso kaj malaltiĝo de la interezo de la ĉina banko ankoraŭ kreskis la sumo de mono ŝparlokita de urbanoj kaj kamparanoj. Kial ordinaraj ĉinoj, kiuj plejparte ne multe enspezas, preferas deponi sian monon en banko? Ĉar en iliaj okuloj, la diversnivelaĵaj ŝtataj bankoj estas plej konfidindaj.

Enketo pri deponado de pekinanoj montras, ke 60% da pekinaj deponantoj opinias, ke deponi ŝparmonon en banko estas pli sekura ol en la hejmo; kaj 25% de ili faris deponon por interezo. La enketo montras ankaŭ, ke 55% da pekinanoj faris deponon por eventuala urĝa bezono en la vivo; kaj la aliaj — por lernopago de siaj infanoj, por la vivo en sia maljuneco, por aliaj grandaj konsumoj.

Post malaltiĝo de la interezo de deponita mono, 40.3% da pekinanoj diris, ke ilia monde-



Kolektanto de argilaj kruĉoj

pono restos senŝanĝa; 35.5% de ili pretas redukti sian deponeblan monsumon por pligrandigi konsumon; kaj 19.5% de ili — fari tion por plimultigi investon aliamaniere.

El la supre menciitaj enketoj videblas, ke ŝparlokado estas ankoraŭ preferata de ordinaj ĉinoj. En tio kuŝas jenaj kaŭzoj: a) ĉinoj prenas kiel virtoton diligentecon kaj ŝparemon en hejmastrumado; b) malaltigo de interezo de deponita mono bazis sin sur daŭra malgrandigo de altiĝ-amplekso de prezoj, tiel ke la praktika interezo de deponita mono restis pozitiva; c) la ĉina financa merkato ankoraŭ ne estas perfekta, kaj ĝin ne bone scias ordinaj ĉinoj, precipe multnombraj kamparanoj.

## TENDENCO DE "INVESTO"

Nun evidentiĝas en Ĉinio, ke multaj ĉinoj komencis preni aliajn vojojn de "investo", kiel aĉeti akciojn. Kvankam ĉinaj akciuloj estas tre malmultaj, tamen borso pri akcio ne plu estas fremda por urbanoj. Statistikoj farita en Ŝanhajo kaj Ŝenzen montras, ke en tiuj du urboj estas 17 milionoj da akciuloj, inter kiuj troviĝas grandaj akcio-posedantoj influantaj borsan kurzon kaj ankaŭ ordinaj ĉinoj vivantaj de pensio. Iuj ĉinoj, kvankam ne posedas akciojn, tamen donas atenton ankaŭ al borsa kurzo kaj lernas kiel fari borson pri akcio. Kompreneble, tio estas nenio por evoluantaj landoj, sed por Ĉinio, kiu starigis financon merkaton nur kvin jarojn antaŭe, tio estas granda ŝanĝo. Kiam la Ĉina Popola Banko emisiis ŝtatajn obligaciojn komence de la 80-aj jaroj, nur


malmultaj ĉinoj aĉetis ilin. Sed poste, pli kaj pli multiĝis la aĉetantoj, ĉar la obligacioj estas emisiitaj de la ŝtata banko, havas asekuran koeficienton pli grandan ol tiu de akcio kaj donas interezon pli altan ol deponita mono. Estis preskaŭ same ankaŭ por borso pri akcio en la komenco. Sed akcio estas pli profita ol la ŝtata obligacio, kaj samtempe, havas pli grandan riskon. Okazis, ke iuj ne niigis sian familian riĉaĵon por kompensi la perdojn kaŭzitajn en borso pri akcio. Malgraŭ tio, multaj ĉinoj preferis aĉeti akciojn. Samkiel ŝparlokado, aĉetado de obligacio de la ŝtato kaj tiu de kompanio, ankaŭ aĉetado de akcio fariĝis unu el la investadoj ŝatataj de ĉinoj.

Lastatempe asekuro fariĝis paroltemo de urbanoj kaj kamparanoj. Ili eksciis, ke ankaŭ asekuro estas esence rimedo de investo kaj ankaŭ poliso — kapitalo. Se eventuale okazos akcidento en la familio, asekura kompanio donos monkompenson por la perdo, kelkoble kaj eĉ kelkdekoble pli grandan ol premio pagita. Somere de 1996, inundo okazis en Hebei, Shandong kaj aliaj provincoj de Ĉinio. La asekuraj departementoj sendis pli ol 2 000 grupojn, kiuj protektis kontraŭ inundo asekuritaĵajn riĉaĵojn kun valoro de pli ol du miliardoj da juanoj kaj donis 3.3 miliardojn da juanoj da kompenso. Tio ludis gravan rolon en socia stabileco kaj produktado en la regionoj suferintaj de katastrofo. Nun la

premio de Ĉinio kreskas je 40% ĉiujare.

Ankaŭ kolektado kaj konservado de objektoj estas rigardataj kiel rimedo de "investo". Iuj ĉinoj kolektas kaj konservas kaligrafiaĵojn, monerojn, poŝtmarkojn, antikvaĵojn, alumetujojn, fabrikmarkojn kaj aliajn. Tiu "investo", kiu aperis kun leviĝo de la aŭkcia merkato de Ĉinio, prosperos kun ĝia disvolviĝo.

Por diri konkrete, la ordinaj ĉinoj havas pli fortan konscion pri investado ol kelkajn jarojn antaŭe. Tamen, plejparto da investantoj havas malfortan elteneblecon pri riskoj. Ĝenerale dirite, ĉinoj enspezas kompare malmulte, tial troviĝas granda diferenco de investo-merkato inter Ĉinio kaj la evoluantaj landoj. La koncepto de ĉinoj pri investado maturiĝos sinkrone kun la plua disvolviĝo de la socialisma merkata ekonomio. ■



Ekzercado

Karikaturo de YE CHUNYANG

Estas bonvenaj represoj kaj tradukoj el "El Popola Ĉinio" kun indiko de la fonto, kaj la redakcio kore petas ties specimenon.

### UTILIGO DE SUNENERGIO EN TIBETO

Tibeto, tegmento de la mondo, plejparte estas sunriĉa. Ĝenerale la jara sunbrila tempo estas pli ol 3 000 horoj kaj la tiea sunradiado estas malpli forta nur ol tiu sur Saharo.

Komence de la 80-aj jaroj ĉinaj sciencistoj kaj teknikistoj starigis tie sunenergian instituton por ekspluati sunenergien kaj servigi ĝin al la tibeta popolo.

Foje, laborantoj de la instituto venis en tibetan vilaĝon, kunportante sunenergian fornon kun lumriceva areo de du kvadrataj metroj. Tie ili komencis varmigi akvon kaj prepari manĝaĵojn per la forno. Minutojn poste, la akvo ekbolis kaj, ankoraŭ momenton poste, la pladoj estis pretaj. Tiu sunenergia forno multe interesis vilaĝanojn, kiuj, dum multaj jaroj, heligis ĉambron per butero kaj hejtis kuirfornon per seka bovfekaĵo. Iu vilaĝano insistis aĉeti la sunenergian fornon per mono kun ekvivalento de duona poefago.

Nun en Tibeto konstruiĝis pli ol 50 000 sunenergiaj fornoj, sunhejtataj domoj kun areo de 150 000 kvadrataj metroj, sunenergiaj varmforcejoj kun areo de miliono da kvadrataj metroj, 50 000-kvadratmetra varm-riceva plataro, destinita por akvo-varmigo, kaj sunenergiaj fotoelektraj instalaĵoj kun kapacito de 600 kilovattoj. Per sunenergio tibetanoj ne nur kuiras manĝaĵojn, sed ankaŭ ŝargas akumulatorojn por faciligi lumigon, televidadon kaj radioelsendon. Nun Tibeto ellaboris novan planon por plue ekspluati sunenergien.

### BONGUSTAJ ĜJAŬZI-OJ

Ĝjaŭzi-o, simila al raviolo, estas tradicia manĝaĵo tre ŝatata de ĉinoj, precipe en norda Ĉinio. En festotagoj ĉinoj preparas ĝjaŭzi-ojn hejme por gajigi la festan atmosferon.


Antaŭe, pro malalta vivnivelo multaj ĉinoj manĝis ĝjaŭzi-ojn nur en la Printempa Festo, farĉitajn el pli da viando kaj malpli da legomo. Sed nun, oni manĝas ĝjaŭzi-ojn ankaŭ en ordinaraĵoj. En Pekino iu restoracio servas per pli-ol-200-specoj de ĝjaŭzi-oj.

Ekzistas diversaj manieroj por prepari ĝjaŭzi-ojn, ekz., kuiru, vaporumi kaj friti. Oni

donas sian grandan atenton precipe al konsisto de farĉo. Viando, markreskaĵoj, fruktoj kaj legomoj povas esti materialoj de farĉo. Krome, ĝjaŭzi-oj preparitaj mane estas plej bongustaj. Kvankam fridigitaj ĝjaŭzi-oj vendiĝas kontraŭ malalta prezo kaj trovas ŝaton de ĉinoj, tamen ili preferas ĝjaŭzi-ojn faritajn de ili mem.

### ĈINAJ VENTUMILOJ

Ĉinaj ventumiloj havas historion de almenaŭ 3 000 jaroj. Komence ili estis uzataj kiel ŝirmilo kontraŭ vento kaj sunlumo por suverenoj kaj nobeloj. Tiaj ventumiloj plejparte estis delikate faritaj el plumo. Poste, kiam suvereno faris vojaĝon, liaj servistoj postsekvis lian veturilon, tenante en la mano du grandajn ventumilojn kiel honoran ceremoniilon. Freskoj en Mogao-ŝton-kavernaro de Dunhuang prezentas



Ventumiloj

tiun scenon. Pli poste, ventumiloj servis kiel ilo destinita por forigi varmon somere kaj iliaj specoj multiĝis.

En norda Ĉinio la ofte uzataj ventumiloj estas rondaj el folioj de tifaŭ (*Typha orientalis*). Ili, malfacile difekteblaj, donas pli fortan venton ĉe ventumado. En suda Ĉinio oni ŝatas ventumilojn plektitaj el bambuaj platoj maldikaj kaj mallarĝaj. Ankaŭ faldeblaj ventumiloj estas vaste ŝatataj en Ĉinio.

Sekve de la vasta uzado de klimatiziloj kaj elektraj ventumiloj, ventumiloj perdas iom

post iom sian uzvaloron, tamen kiel metiartaĵo, ili havas valoron pli kaj pli grandan. En Ĉinio estas diversaspecaj ventumiloj, kiaj pluma, papera, silka, santala kaj ebur-skulptita, kiuj longas de tri cm ĝis kelkaj metroj. En 1985 Suzhou-a artisto faris santalan ventumilon, la plej grandan en Ĉinio. Disvolvite, ĝi longas je unu metro. La plej granda faldebla ventumilo kun longo de pli ol tri m povas esti disvolvita de almenaŭ kvar homoj. Sur ĝia ekrano belas la reliefa bildo "Naŭ Drakoj Ludas Globon".

Kun kaligrafaĵo sur si la ventumilo estas rigardata kiel artaĵo. Laŭdire, en la Orienta Jin-dinastio (317-420) fama kaligrafo Wang Xizhi faris surskribon sur la ventumilo por malriĉa maljunulino, kaj ĉi tiu vendis ĝin kontraŭ cent da moneroj po ĉiu ideogramo. Poste, furoris iom post iom surskribado kaj pentrado sur ventumilo. Sekve de tio, naskiĝis la arto pri beligo de ventumilo. Ventumilo kun belskribo kaj pentraĵo de fama kaligrafo estas rigardata kiel raraĵo.

Krome, ventumilo servas ankaŭ kiel rekvizito sur la scenejo de ĉina teatro, kies malsamaj roluloj tenas malsamajn ventumilojn en la mano.

## LA PLEJ FRUA LIGNO-TIPOGRAFIO

Bi Sheng de la Norda Song-dinastio (960-1127) inventis argilo-tipografion la plej fruan en Ĉinio kaj Wang Zhen de Yuan-dinastio (1279-1368) — ligno-tipografion. Sed lastatempe ĉinaj arkeologoj konstatis, ke la budhisma sutro el naŭ volumoj kun 100 000 hieroglifoj de la Okcidenta Xia-dinastio (1038-1227) elterigita en nordokcidenta Ĉinio en 1991 estis la plej frua eldono de ligno-tipografio en la mondo. Tiu malkovro atestis, ke pli ol 100 jarojn antaŭ Yuan-dinastio jam aperis ligno-tipografio.



XIAO KE:

# LA LASTAJ KARAVANOJ

**E**N la gubernia urbo de Boko en orienta Tibeto troviĝas neordinara gastejo, kiu, kun vicoj da domoj nemeblitaj ene, senpage servas speciale por karavanoj de la najbara Medo-gubernio. Ĝenerale, la noktantaj karavanoj mem pretigas litajon kaj mem preparas manĝaĵon.

La karavanoj de Medo eble estas la lastaj en Ĉinio. En 1995 ŝoseo etendiĝis tien. Pro alta montaro kaj danĝera vojo, duonjare kovrita de neĝo kaj duonjare atakita de kotŝtona fluo, aŭtoj veturas nur kelkfoje en la jaro sur parto de la ŝoseo. En la neveturebla parto la vartransportado dependas de karavano. Tial ĝi estas nemankigebla en la vivo de Medo-anoj.

Inter la gubernia urbo de Medo kaj tiu de Boko estas distanco de almenaŭ 100 kilometroj. Por iri la vojon la karavano bezonas tri tagojn; dume por iri la vojon de vilaĝo de Medo al Boko — dek tagojn. En la gubernia urbo de Boko ni renkontis kavaranon el dekelkaj homoj. Ili eliris fari la lastfojan transportadon antaŭ ol estis neĝkovrita la montaro kaj, ses tagojn poste, atingis la urbon. Inter ili troviĝis pli-ol-60-jara maljunulino, kiu vojaĝis al Lhasa por viziti sian filinon.

Badeng, la gvidanto de tiu ĉi karavano, estis malalta, maldika kaj gaja. Li diris: "Ses tagojn ni mont-grimpis. Ni ĉiuj kunportis spadon por nin gardi. Ni nin armis ankaŭ per ĉasfusilo kontraŭ rabobestoj." "Mi vidis nemalmultajn tigrojn, kiujn vi urbanoj vidis nur en bildoj. Tamen ili senescepte evitis nin pro nia grandnombreco. Kaj por ni, ni ne volas vundi ilin, protektatajn de la ŝtato." "Kiam venis vespero, ni ripozis sub arbo. Antaŭ ekvojaĝado ni pretigis al ni sufiĉe da manĝaĵoj, du provizojn por ĉiu manĝo. Ĉiufoje sur la vojo ni prenis unu el ili kaj pendigis la alian sur arbo je bezono sur la revena vojo. Dek tagojn poste, kiam ni reiris, ni trovis, ke la manĝaĵoj ankoraŭ pendas sur arboj — oni bone scias, ke ili apartenas al karavano."

"Ĉiufoje la karavano konsistas el po homo de

## KURANTAJ AFEROJ

● Antaŭ tri jaroj la ĉina registaro metis la ĉinan ekonomion sub makroregadon por garantii ĝian rapidan kreskadon kaj efike bridi inflacion. Laŭplane en 1996 la ĉina ekonomio devis kreski je 8%, sed fakte — je 9.7%; laŭplane la altiĝ-procento de la prezoj de podetalaj komercaĵoj devis esti 10%, sed fakte ĝi reduktiĝis al 6.1%.

● La importaĵa kaj eksportaĵa valoro de Ĉinio en 1996 atingis 290 miliardojn da usonaj dolaroj, je 3.2% pli multe ol tiu en 1995. Japanio, Usono, Hongkong kaj la Eŭropa Komunumo estis la unuaj kvar komerc-kunuloj de Ĉinio.

● En 1996 la aviada grupo de la Ĉina Internacia Aviada Kompanio kreis novan rekordon de 42-jara sekura flugado. Ĝi okupis la duan lokon en la mondo tiurilate.

● En 1996 la Ŝanhaja Limigita Aŭta Kompanio Volkswa-



**Mangeblaj floroj bredataj**

gen, kune investita de Ĉinio kaj Germanio, produktis 200 000 personaŭtojn kun marko Santana kaj la jara vendvaloro superis 20 miliardojn da juanoj (8.3 juanoj egalas unu usonan dolaron). Ĝis la fino de la lasta jaro la nomita kompanio produktis entute 746 000 personaŭtojn de malsamaj tipoj.

● Altrapida trajno de Ĉinio provveturis kun rapido de 212.6 km/h kaj per tio atingis la internacian normon.

● Ĉinio posedas 47 000 hektarojn da agroj por kulturaj flo-

roj. Floroj havas en si proteinojn, grason, amelon, sukerojn, 22 specojn de aminaj acidoj, 18 specojn de vitaminoj, ferojn, magnezion kaj altenergiajn aktivajn substancojn. En Ĉinio estas pli ol 100-specaj floroj mangeblaj.

● Instituto pri maraj estaĵoj kaj aliaj koncernaj unitoj de Fujian (Fugĵan)-provinco, Ĉinio, sukcesis en bredado de grandaj ŝtonkapaj fiŝoj. Post 18-monata bredado de pli ol 2.5-cm-longaj alvusoj 57.5% de ili postvivis kaj ilia meznombra pezo estis 0.35 kg.

ĉiuj familioj de la vilaĝo, kaj ĉiu homo zorgas pri kvar ĉevaloj. Forirante de ĝi, ni kunportas mal multe, ĉar la en Medo produktita greno sufiĉas nur por ni Medo-anoj, kaj lokaj produktaĵoj estas preskaŭ samaj kiel tiuj en Boko. Revenante ni multe kunportas, kaj objektojn de la ŝtato kaj vivbezonaĵojn de vilaĝanoj. Karavana transportado estas peniga, tamen la enspezo alta. Se ni laboras pli diligente, ni enspezos pli ol dek mil juanojn jare.” “Ĉi-foje ni laboras senpage por transporti cementon cele konstrui vilaĝan elementlernejon.”

La 24-jara Meiduo Yuzhen estas nevino de Badeng. Ŝi portis jakon kaj vaker-pantalonojn. Menciante sian hejmlokon, la onklo kaj nevino ambaŭ aspektis ĝojplenaj. Dank' al ili, ni ekhavis fundamentan konon pri Medo.

La gubernio Medo havas areon de dudek mil

kvadrataj kilometroj, kun ok mil loĝantoj vivantaj en la profunda montaro. Ili loĝas en lignaj domoj kaj sin vivtenas per terkulturado. Tie regas klimato humida kaj varma, kaj produktiĝas legomoj kaj fruktoj, kiaj en subtropika zono. La lokanoj, tre modestaj kaj honestaj, ne kutimas ŝlosi la pordon, kiam ili foriras de sia domo. Pro neoportuna trafiko ne progresas la tiea komercado. Oni konsilis al karavananoj fari komercadon anstataŭe, tamen ili preferas transportadon. Ĉar laŭ ili komercado estas kaprompa.

La montaro estis kovrata de neĝo, alie ni havus ŝancon sekvi la karavanon al Medo. Kun sincereco Badeng invitis nin al Medo en la venonta jaro. Rimarkinte, ke ni ne estas certaj pri la vizito, li sentis bedaŭron. ■

# Post liberiĝo el pezaj ŝarĝoj

de ZHANG WEN


**K**IEL multaj aliaj ŝtataj entreprenoj de Ĉinio, la en 1957 fondita Kantona Ŝtalejo suferis de pezaj ŝarĝoj. Fine de la 70-aj jaroj la ŝtalejo havis 10 000 laboristojn kun jara produktokvanto de 100 000 tunoj da ŝtaloj. Malnovaj ekipaĵoj, serioza malŝparemo kaj malalta laborproduktiveco kaŭzis al la ŝtalejo deficiton de 9 milionoj da juanoj en 1979. Krom elspezo por kuracado de laboristoj, pensio de emeritoj kaj subvencio al manĝejo, lernejo kaj infanĝardeno de la ŝtalejo, ĝi havis neniun kapitalon por disvolvi produktadon. Aliflanke, post rompiĝo de la planizita ekonomia sistemo, granda kvanto da aliprovincaj kaj alilandaj ŝtaloj vendiĝis en Guangdong-provinco, tiel ke la Kantona Ŝta-

lejo perdis privilegion kiel la ununura ŝtal-provizanto de Guangdong.

Nun la ŝtalejo jam fariĝis Ŝtala Grupo-kompanio de Kantono, kies stato tute aliĝis ol antaŭ dekkelkaj jaroj. S-ro Chen Jialing (Ĉen Ĝjaling), direktoro de la kompanio, diris, ke estas reformado, kiu liberigis la entreprenon el la pezaj ŝarĝoj. Unue, la antaŭaj laborejoj fariĝis fabrikoj, kiuj havas la rajton de memstara administrado. En la unua jaro post la ekpraktikado de reformado ĉiuj fabrikoj profitis de la plialtiĝo de labor-entuziasmo. Poste la kompanio decidis, ke la manĝejo, lernejo, hospitalo k.a. malfermiĝu al la socio premisante kontraŭpagan servon al la kompanio. Rezulte de tio, 3 000 laborantoj en la supre menciitaj

organizaĵoj ne nur havigis al si vivovojon, sed ankaŭ gajnis multan profiton por la kompanio. En la posta periodo de la 80-aj jaroj la Kantona Ŝtalejo la unua el la lokaj ŝtal-entreprenoj de Ĉinio komencis la provon importi eksterlandan kapitalon kaj praktiki akcian sistemon. Krome ĝi faris teknikajn reformojn kaj ĉiamaniere klopodis por neniigi malŝparemon kaj redukti produktokoston. Laŭ difino, 50% da premio por la laboristoj dependas de reduktiĝo de produktokosto. En la jaroj 1980-1995 la kompanio aĉetis ekipaĵojn avangardajn en la mondo, tiel ke la produktokosto reduktiĝis jaron post jaro, la jara ŝtala produktokvanto kreskis de 136 000 al 827 000 tunoj, kaj la jara profito — de 383 000 juanoj al 163 milionoj da juanoj. Menciante sian sukceson, la kompanianoj diris, ke liberiginte sin el la pezaj ŝarĝoj, ili povas koncentri sian atenton al produktado kaj la kompanio havas pli da kapitalo por teknika reformado.

La ŝtala produktokvanto de Ĉinio en 1996 superis 100 milionojn da tunoj, kaj la strukturo de la ŝtala industrio multe ŝanĝiĝis. Precipe ĝojindas, ke la jara produktokvanto de kontinue mulditaj ŝtaloj kreskis 47-oble en 1996 kompare kun tiu en 1978, en kiu Ĉinio komencis la reformadon kaj malfermon. Al tio kontribuis ankaŭ la Ŝtala Grupo-kompanio de Kantono. ■



Ŝtalo produktita de la grupo-kompanio, transportota aliloken

# Fusong — ginsenga gubernio

de ZHENG ZHENJIE



Ginsengoj rikoltitaj

**D**E antikve ĉinoj prenas ginsengon kiel altvaloran tonikon.

Dank' al siaj favoraj naturaj kondiĉoj, Fusong-gubernio famiĝis en Ĉinio pro siaj ginsengoj. Ginsengo estas postulema je grundo, klimato kaj humideco en sia kreskado, ekz., ĝi ne povas esti rekte priradiata de sunlumo, sed povas esti dise, oblikve kaj refrakte priradiata. Tiajn kondiĉojn havas Fusong.

La nomita gubernio troviĝas en la sino de Changbai-montaro en nordorienta Ĉinio je ĉ. 600 m super la marnivelo, kun klimato de la humida malvarma zono. La gubernio areos 6 500 kvadratajn kilometrojn, kies 78% estas kovritaj de arbaroj, kiuj ne nur ŝirmas la teron kontraŭ la rekta

priradiado, sed ankaŭ liveras sufiĉe da sunlumo kaj varmo al kreskado de ginsengo. Tie en arbaroj humtavolo dikas je 15 cm kaj pluvo estas riĉa. En 1992, lokano trovis sovaĝan ginsengon konsistantan el 12 korpoj, el ili la plej granda pezis je 340 g. Kompreneble, sovaĝaj ginsengoj estas multe pli valoraj ol la kulturitaj. Tamen, la sovaĝaj semiĝas nur de vento, akvo, birdoj kaj bestoj sen ebleco de selektado. Kaj ilia kreskado estas malrapida. Tial la sovaĝaj ne povas kontentigi la merkatan bezonon. Ginsengoj vendataj en merkato plejparte estas kulturitaj.

La ginsengo-kulturado en Fusong havas historion de 400 jaroj. Hodiaŭ, la loko posedas la plej grandan

ginsengo-kultivejon en Ĉinio, kaj ĝia eksporta kvanto de ginsengoj konsistigas 60% de tiu de la tuta lando. Mi vizitis tiean ginsengo-kultivejon. Grandaj kaj malgrandaj ginsengoj floris en densa arbaro sur granda monto. Por ŝirmi kontraŭ la sunlumo, sur la kampoj starigis budoj el blua plasta membrano. Direktoro de la kultivejo diris al mi, ke la kreskado de ginsengo ĝenerale daŭras 6 jarojn. En aŭtuno oni prisemas kampojn kaj unu jaron poste ginsengaj plantidoj dikas nur kiel alumeto. 3 jarojn poste, oni devas transplanti ilin por ilia daŭra kreskado. Kampo, post unufoja rikolto de ginsengo, bezonas 33-jaran ripozon por denova ginsengo-kultivado.

En Fusong prosperas ne nur ginsengo-kulturado, sed ankaŭ ginsengo-prilaborado kaj komercado. Oni pulvorigas ginsengon por fari el la pulvoro trinkaĵon. Kaj oni dispecigas ginsengon por manĝi aŭ kuiri kune kun viando. Ginsengo estas ofte uzata kiel grava elemento de ĉin-medicinaj medikamentoj. Nuntempe, Fusong povas fari el ginsengo pli-ol-200-specajn produktaĵojn de 11 serioj. La Changbai-a ginsengo-foirejo ne malproksime de la gubernia urbo allogas multajn komercistojn ĉinajn kaj alilandajn. En Fusong funkcias ankaŭ la Muzeo de Ginsengo, unika en Ĉinio. ■



## 20 sanigaj ekzercoj (III)

**E**N ĉi tiu numero koniĝas la 9-14-aj ekzercoj. La 9-a, 10-a kaj 11-a estas destinitaj por ekzerci la dorsajn kaj lumbajn muskolojn cele preventi kaj kuraci lumbalgion kaj gambalgion, dum la 12-a, 13-a kaj 14-a — por ekzerci la abdomenajn, dorsajn kaj lumbajn muskolojn kaj krome ili utilas ankaŭ al la ŝultraj artikoj.

### Naŭa ekzerco

Staru kun la du piedoj disigitaj en la distanco iom pli longa ol tiu de la ŝultroj. Frotu viajn du manplatojn kaj mandorsojn reciproke. Metu la manojn ĉe la talion kun la dikfingroj antaŭe.

Forte frotu viajn lumbojn, sakron kaj gluteojn per la manoj (Bildo 13).

Turnu viajn lumbojn de maldekstre malantaŭen, dekstren kaj antaŭen (Bildo 14). Faru la samon en inversa direkto. Dum turnado tenu viajn genuojn kaj torson rektigitaj. Turnu ilin en pli kaj pli larĝa amplekso, tamen ne ŝancelu la korpon.

### Deka ekzerco

Staru kun la du piedoj disigitaj en la distanco iom pli longa ol tiu de la ŝultroj kaj kun la du brakoj pendantaj.

Pugnigu vian maldekstran manon kaj metu ĝin ĉe la talion. Turnu vian maldekstren. Pugnigu vian dekstran manon kaj puŝu ĝin ĝuste antaŭen kun la brakoj paralelaj kun la ŝultroj. Turnu vian kapon maldekstren-malantaŭen (Bildo 15). Faru la samon ĉe la alia flanko. Faru ĉiujn movojn malrapide kun la pojnoj iom streĉitaj. Tenu viajn brakojn nerigidigitaj, kun la du piedoj senmovaj. Enspiru, kiam vi puŝas vian manplaton, kaj elspiru, kiam vi retiras ĝin. En la komenco vi devas fari la movojn malforte kaj malrapide kaj post kelka tempo vi povas movi la koncernajn korpopartojn en pli larĝa amplekso.

### Dekunua ekzerco

Staru kun la du piedoj disigitaj en la distanco iom pli longa ol tiu de la ŝultroj kaj kun la du brakoj pendantaj.

Turnu vian maldekstren kun la maldekstra kruro arkigita kaj la dekstra kalkano sur la tero. Etendu la maldekstran manon antaŭen, faru duoncirklon per ĝi kun la mankavo malsupren kaj metu ĝin ĉe la talion. Etendu la dekstran manon antaŭen iom forte, por ke la tendenoj de la gluteoj estu streĉitaj (Bildo 16). Faru tion alterne ĉe la du flankoj.

### Dekdua ekzerco

Staru kun la du piedoj disigitaj kaj kun la du manoj

krucitaj antaŭ la abdomeno.

Klinu vian antaŭen kun la okuloj rigardantaj al la du manoj (Bildo 17). Rektigu vian kaj levu la du manojn super la kapon kaj tie krucu ilin. Levu la manojn kun la korpo rektigita, kvazaŭ vi grimpus supren, por ke la tendenoj estu streĉitaj laŭeble (Bildo 18).

Etendu la du brakojn ambaŭflanken kaj reprenu la originan teniĝon. Rigardu la maldekstran kaj dekstran manojn alterne. Enspiru, kiam vi levas la manojn, kaj elspiru, kiam vi mallevas ilin.

### Dektria ekzerco

Staru kun la du piedoj disigitaj en la distanco iom pli longa ol tiu de la ŝultroj kaj kun la du brakoj pendantaj.

Klinu vian antaŭen kaj fleksetu viajn genuojn. Levu vian maldekstran manon supren-maldekstren, turnu vian kapon ankaŭ en tiu direkto kaj rigardu la maldekstran manon. Premetu la maldekstran genuon per via dekstra mano (Bildo 19). Faru tion alterne ĉe la du flankoj.

Enspiru, kiam vi turnas vian kapon dekstren aŭ maldekstren. Elspiru, kiam vi reprenas la originan teniĝon. Levu la manojn malrapide.

### Dekkvara ekzerco

Staru kun la du piedoj disigitaj en la distanco iom pli longa ol tiu de la ŝultroj kaj kun la du brakoj pendantaj.

Tenu vian maldekstran pugnon ĉe la talio. Puŝu antaŭen vian dekstran manplaton starigitan. Turnu vian maldekstran piedpinton maldekstren. Turnu ankaŭ vian supran korpoparton en la sama direkto (Bildo 20).

Disvolvu vian maldekstran pugnititan manon. Etendu ĝin maldekstren. Platigu ankaŭ vian dekstran manon kun mankavo malsupren kaj levu la du brakojn supren, dekstren, antaŭen-malsupren kaj maldekstren. Retiru la maldekstran manon kaj metu ĝin ĉe la talion, dume faru la dekstran manplaton starigita (Bildo 21). Kiam vi turnas la brakojn, viaj supra korpoparto kaj brakoj devas moviĝi al la sama direkto. Faru tion du sinsekvajn fojojn.


Retiru la dekstran manon kaj metu ĝin ĉe la talion. Platigu la maldekstran manon kaj puŝu ĝin dekstren. Turnu dekstren viajn dekstran piedpinton kaj supran korpoparton. Faru la samon montritan en la supra alineo, tamen en la inversa direkto. Ĉiufoje, kiam vi spiras, turnu alterne la du brakojn. Faru tion malrapide, kun la rigardo fiksita sur la du manoj, la du kruroj rektigitaj. Tamen ne fleksu la genuojn. ■




**Bildo 13**



**Bildo 14**




**Bildo 15**




**Deka ekzerco**

**Naŭa ekzerco**




**Bildo 16**



**Dekunua ekzerco**




**Bildo 17**




**Bildo 18**


**Dekdua ekzerco**



**Bildo 19**




**Dektria ekzerco**




**Bildo 20**

**Dekkvara ekzerco**



**Bildo 21**



**Dekkvara ekzerco**



# Tonika brando Yeduchun



Direktoro Wu Xinglin



Fabrikestro Xu Guojin

Tonika brando Yeduchun estas farita laŭ budhisma recepto de Yanshoutang, Suining, Sichuan-provinco, per tradicia

teknologio kaj modernaj sciencoj kaj teknikoj, el bonkvalita sorgo-brando, kando, mielo, hunda reno, longanoj, ginsengo kaj aliaj ĉ. 30 valoraj, bonkvalitaj ĉinaj drogoj. Antaŭ ol liveri ĝin al la merkato, oni devas konservi ĝin longatempe. Ĝia produktado estas sankciita de la Higiena Buroo de Sichuan-provinco post rigora laboratoriaj ekzamenoj pri la kvalito kaj kemiaj substancoj. Ĝi estis premiita en 1996 kiel eminenta saniga trinkaĵo de Sichuan-provinco.

La trinkaĵo estas utila al rena funkcio, sperma produkto kaj longigo de vivo.

Yeduchun, meze forta, palfla-

va, trasidebla kaj iom dolĉa, estas konvena al ĉiuj homoj.

Generala agentejo de vendado: Tang Jiu Gongsi, Suining-shi, Sichuan, Ĉinio.

Reprezentanto de la leĝa persono: Wu Xinglin

Adreso de la agentejo: Nr. 168, Suizhou nan-lu, Suining-shi, Sichuan, Ĉinio

Tel.: +86 825 2223649

Fabriko de la Tonika Brando Yeduchun, Suining, Ĉinio

Fabrikestro: Xu Guojin

Tel.: +86 825 2233660

Adreso de la fabriko: Minyue-lu, Jingji Jishu Kaifa Qu, Suining-shi, Sichuan, Ĉinio

授予:遂宁市野渡春滋补酒厂  
96首届培育和保护四川营养保健饮品、食品研讨展示会

优质健康饮品

四川省保健科技学会  
四川中华食品文化研究会  
一九九六年十二月三十一日



Brando-serio de Yeduchun

Ĉe boat-kaja strato de Venecio  
de RUDOLF SKORUPPA (Germanio)



Parko en San-Diego de Usono  
de RUBEN FELDMAN GONZALEZ  
(Usono)



ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九七年第五期  
(本刊代号: 二—一九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2